HUNGARA VIVO

LITERATURA-ARTA REVUO

6
1975
8,–Ft



VINEKONOMIAJ ENTREPRENOJ VINKELMASTRUMOJ

BORGAZDASÁGI VÁLLALATOK
PINCEGAZDASÁGOK

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XV. jaro 1975. 6-a numero

Numero pri Lajos Tárkony

Enhavo

V. Benczik: Intervjuo kun Lajos Tárkony 1
L. Tárkony: Mia fratino, La spegulo 3
K. Kalocsay: La „Okcidento" de Tárkony 4
Mozaiko 5
Bukedo de la redakcio 6
L. Tárkony: Nikolao Hohlov: La Tajdo 7
A. József: Saluto al T. Mann. Tr. Tárkony 9
C. Baudelaire: La morto de l'artistoj — Tr. Tárkony 9
L. Tárkony: Petunio 9
Skiza bibliografieto de la verkaro (de Lajos Tárkony) 10
Henri Baupierre Jen: Demandoj 11
L. Tárkony: Mozart inter la arboj, En hospital-fenestro 11
L. Tárkony: Revuo de revuoj 12
D-ino Flóra Szabó-Felső: Internacia Jaro de Virinoj 14
Kunĉo Valev: Proverboj pri la virinoj 15
Dezső Kosztolányi: Virinoj 16
Panoramo — Komp. kaj trad.: Sz. Bálint, SZMR 18
D-ro Ferenc László: La ŝirmado de la pureco de akvoj en Hungario 20
Lajos Lesznai: Kodály-Instituto en Hungario 26
Nova grava iniciato 28
E. Pallós: 26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso 29
O. Knichal: La lingva problemo en sindikata konferenco 30
V. Benczik: Impresoj de novbakita ĵuriano 30
Zoltán Zelk: Epitafo, Naŭ versoj pri feliĉa hororo — Tr. Fejes 30
FERI: Krucenigmo 31
Hungarlando invitas Vin por 1976 32
Sur la titalpaĝo: L. Tárkony — Foto de Z. Fejér

Intervjuo kun Lajos Tárkony

Antaŭhistorio 1961. Startis Hungara Vivo. 16-jara gimnaziano en la provinca hungara urbo Tatabánya vartas literaturajn revojn. Li tradukas al Esperanto novelon de Jenő Heltai: La pulo de Abu Majub, kaj sendas ĝin al la redakcio de la revuo. Post kelka tempo revenas al li malgajige dika koverto: krom la resendita manuskripto ĝi enhavas ankaŭ malnovan numeron de Literatura Mondo kun la traduko de la sama novelo. La gimnaziano rigardas la nomon de la tradukinto: *L. Tárkony.* Hm. Kaj la traduko dolorige superas la lian.

1962. Landa Esperanto-kongreso en Budapeŝto. 17-jara gimnaziano serĉas en la tumulto la senharan Mefistan kapon de Kalocsay. Li sukcesas, kaj post duonhoro jam sidas triopo ĉe la tablo de restoracio: Kalocsay, li, kaj grizhara, silentema nekonato. „Sinjoro profesoro", balbutas la gimnaziano, „mi sendis al Vi tridekon da poemoj, ĉu Vi...?" „Poemoj?", streĉas la memoron Kalocsay. „Ah, jes! Mi donis ilin al Lajos ...", li kapsignas al la nekonato. „Al Lajos *Tárkony.*" Fulmotondro! *Tárkony* ...

La gimnaziano tim-demande rigardas al la grizharulo, kiu silente, kvazaŭ honteme ekparolas: „Mi legis ilin. Sed redoni ilin mi ne povas... Mia dommastrino forĵetis ilin... Pardonu, sed pli bone tiel. Vi ne estas poeto." La gimnaziano malgaje partoprenas en la nun sekvanta diskuto, kiun Kalocsay eklanĉas pri vinoj. Post certa tempo tamen Kalocsay devas por kelkaj minutoj forlasi la tablon. Tárkony ekparolas: „Pardonu pro la *paperoj*... Sed via Heltai-traduko tamen ne estis malbona. Kaj morgaŭ mi kunportos por vi libron. Recenzu ĝin por HV."

1975. La iama gimnaziano nun intervjuas por HV sian unuan mildvoĉan, sed kruele sinceran kritikinton.

La kleraj esperantistoj ĉie en la mondo konas viajn verkojn, sed malmulte scias pri vi mem, pri via „civila", neesperantista vivo. Ĉu vi komplezus regali nin per kelkvorta biografieto?

Poeto ordinare konfesas pri si mem en siaj poemoj kaj ankaŭ diras ĉion, kion li opinias interesa por la mondo. La ceteron li juĝas malgrava, kaj mi vere ne scias, kial mi devus komuniki, kiomfoje kaj kiam mi estis ebria aŭ enamiĝinta aŭ havis dentodoloron.

Kompreneble mi naskiĝis (Budapest, 1902), havis kvin fratojn, post la abiturienta ekzameno fariĝis studento de jurscienco, sed pro malsano mi devis ĉesigi la universitatajn studojn. Poste mi oficistis ĝis mia pensiiĝo. Kiel mi fariĝis esperantisto, tion mi priskribis en mia poemo „Kvar sezonoj en 1919" (H. V. 1974/3). En la dudekaj jaroj mi vizitadis la Esperantajn klubkunvenojn kaj tie mi amikiĝis kun Karlo Bodó, kiu en 1924 jam apartenis al la redakta komitato de Literatura Mondo. Li kondukis min en la redaktejon de LM, kaj tie Kalocsay, ĉu por min animi aŭ fortimigi, trans-

donis al mi por recenzo la libron de Kant pri la eterna paco. Mi ne fortimiĝis, eĉ verkis longetan recenzon. Kiam mi ĝin transdonis kaj kiam ĝi eĉ aperis, mi sentis min sanktoleita LM-ano. Kompreneble LM baldaŭ ĉesis. Tamen mia LM-aneco ne perdiĝis: kiam LM reaperis en 1931, mi fariĝis kune kun Szilágyi ĝia redaktoro sub la ĉefredaktoreco de Baghy kaj Kalocsay. De tiam oni povus diri, ĉio kara kaj bela (kaj ankaŭ malagrabla) de mia vivo kroĉiĝis al LM kaj poste al HV. Fakte, la tempo inter tiuj du revuoj ŝajnas al mi dezerto, almenaŭ nenion memorindan mi povus el ĝi rakonti.

Via vivoverko ampleksas tri kampojn: la originalan poezian verkadon, tradukadon kaj verkadon de eseoj. Kiun el la tri kampoj en via verkado vi konsideras la plej grava?

Oni komencis min rigardi eseisto, ĉar LM eldonis de mi volumon da eseoj, sed en tia direkto min puŝis eble tio, ke mi prezentiĝis en LM per la nomita kvazaŭesea recenzo. Poste pli kaj pli fremdiĝis al mi tiu artospeco, eble ankaŭ pro la malagrablaĵoj, kiujn mi tiris sur mian kapon per mia eseo pri Baghy. Tiel mi restis ĉe la poezio originala kaj tradukita; ĉi tiujn miajn kreaĵojn mi rigardas miaj veraj infanoj.

Kiel tradukisto vi ne limigis vian agadon al la poezio, eĉ, viaj prozaj tradukoj estas ne nur altnivelaj, sed ankaŭ multnombraj. Ĉu vi neniam pensis verki originalan prozon?

Mi pensis verki ankaŭ originalan prozon, du aŭ tri el tiuj preskaŭaj noveloj eĉ aperis en LM. Sed ili estas tiel memcentraj, ke ilia ĝusta formo estus versa. Tiam ili estus pli mallongaj, sed pli riĉenhavaj. Rekoninte ĉi tion, mi turnis mian dorson al la beletra prozo.

Estas okulfrape, ke poezion vi tradukis preskaŭ ekskluzive el la franca, kaj apenaŭ el la hungara. Kial?

Mi povus diri, ke la hungarajn poemojn Kalocsay fortradukis de antaŭ mi. Tamen kelkajn mi povis ankoraŭ kapti ĝustatempe; tiuj (de Babits, de Arany, de Lőrinc Szabó, de Illyés) aperis en LM aŭ HV. Se mi volus malici kontraŭ mi mem, mi dirus, ke el la franca kaj itala estas pli facile traduki ol el la hungara, ĉar la franca kaj itala estas malpli densaj lingvoj. Tamen, por ekskuzo mi povas diri, ke mi faris provojn ankaŭ pri tradukoj de anglaj poemoj, eĉ de Shakespeare-soneto.

Kian estonton laŭ via opinio havas la Esperanta literaturo, precipe la originala? Kiuj estas ĝiaj virtoj kaj malvirtoj? Ĉu vi povus mencii kelkajn nomojn, kiuj aperis lastatempe kaj estas atentindaj? Kaj kurioza demando: se vi povus kunpreni kvin esperantajn librojn por longa ŝipvojaĝo, kiujn vi elektus?

Mia opinio pri la Esperanta literaturo, ĉu originala, ĉu tradukita, estas tio, ke ĝia nura ekzisto estas miraklo. Por ke literaturo vivu, necesas tri aferoj: verkistoj, aper-eblaĵoj (literatura revuo, eldonejo) kaj publiko. Oni povus diri ankaŭ, ke la lasta kondiĉo estas primara: multaj, ni diru 10 000, literatur-konsumantoj kreus la du antaŭajn kondiĉojn. Sed manke de ĝi la Esperantaj verkistoj povas fari du aferojn: aŭ eksilenti, aŭ verki nacilingve. Krome, la Esperanta literaturo havas la saman malŝancon, kiun la movado mem: ĝi jam elkreskis el la respektinde naiva entuziasmo de la „heroaj" jaroj kaj estas elmetita al pretendoj, kiajn oni metas kontraŭ severe serioza realismulo, sed ankoraŭ ne atingis tian maturecon, nek tian materian povon. Se vi volas aŭdi kelkajn nomojn de verkistoj, kiuj ĉiospite tamen povis sin fari menciindaj kaj atentindaj, jen kiuj venas subite en mian kapon: *W. Auld, Marjorie Boulton, Rosbach, Miyamoto, de Kock, A. Goodheir, Balbin.* Koncerne la kvin librojn, mi kunportus la Plenan Gramatikon de Kalocsay kaj Waringhien, la „Lingvo kaj Vivo" de Waringhien, la Lear-tradukon de Kalocsay, La Faraonon, ĉar ĝi estas sufiĉe dika, kaj „Ŝtupoj sen nomo" de Ragnarsson, ĉar tie mi havus multan tempon por rompi al mi la kapon.

Kia vi vidas la nivelon de la nuntempa Esperanta kritiko?

Eble mi ne estas tro severa, dirante ke tute ne ekzistas Esperanta literatura kritiko, ekzistas nur recenzoj, pli ĝuste recenzetoj, Ĝermoj de literatura kritiko ŝajnis montriĝi en Norda Prismo kaj en Monda Kulturo kaj ankaŭ en HV, sed la du unuaj revuoj malaperis kaj la kritiko bedaŭrinde ne apartenas al la profilo de nia revuo.

Post la apero de Soifo aperas tre malmultaj originalaj poemoj el via plumo. Ĉu vi havas iajn literaturajn planojn?

Nu, en HV aperis pluraj el miaj post-Soifaj originalaj poemoj. Mi ne havas planojn pri poem-verkado, mi verkas ilin, kiam ili naskiĝas en mi.

Tikla demando. Iuj malice asertas, ke via literatura agado troe ligiĝas al tiu de Kalocsay. Ĉu vi povus skizi kelkvorte, en kio diferencas la karaktero de via talento de la lia?

La demando tute ne estas tikla. De kvardek jaroj mi laboras kune kun Kalocsay ĉe LM kaj HV. Mi apartenas al tiu societo, kiu lin regule vizitadas. Li estas la unua leganto de miaj verkaĵoj, kaj mi la unua leganto de la liaj. Mi akceptis la poetikon, kiun li kaj Waringhien eksplikis en la Parnasa Gvidlibro. Tial oni plurfoje brulstampis min kiel Parnasanon, sed mi estas nur Parnasa Gvidlibrano kaj havas nenion komunan kun la francaj Parnasanoj (Leconte de Lisle, Heredia). Sed nun estas ja mode versî en unu barelon ĉion, kio estas ritma, rima kaj komprenebla. Laŭ tiaj kriterioj ankaŭ Heine, Petőfi, Hugo, Burns kaj Puŝkin estis Parnasistoj. Pri la demando, per kio mia poezio diferencas de tiu de Kalocsay, respondu la literatura kritiko, se ĝi iam naskiĝos en Esperantujo kaj trovos mian poezion inda je esploro.

Vilmos BENCZIK

LAJOS TÁRKONY

MIA FRATINO

Fratinon mi deziris iam, frato
plej juna el ses fratoj, fratineton.
Mi kvazaŭ sentis, ke patrino mia,
min tre amanta, de mi tre amata,
atendis fine naski filineton
anstataŭ mi, filinon post kvin filoj,
do mi dividis kun ŝi senkonscie
ŝian deziron je la knabineto;
fratinon mi deziris, kaj, finfine,
fratin-kompense, iom knabineske,
mi mem fariĝis, kiun mi deziris
kaj la patrin' deziris: fratineto.

Kruela estas hom-alternativo:
aŭ morti frue jam, kaj tiam esti
enterigata de amantoj niaj,
aŭ vivi longe kaj mem enterigi
iom post iom niajn plej amatajn.
Jen kiel mi fariĝis tombfosanto
de l' familio, ĝis mi restis fine
senpatra, senpatrina kaj senfrata,
solulo en la fremdiĝanta mondo
kun societ' revata kaj sonĝata
el palaj ombroj de la memoratoj
kaj el plej pala ombro: tiu eta
fratino, kiun tiel mi deziris,
kaj kiu mi mem ŝajnis esti iam.

Tiel mi vivis inter miaj ombroj,
mi, olda fraŭlo, princo suverena
de neŝtopitaj ŝtrumpoj kaj korvundoj,
urba nomad' kun loĝproblem' refrena,
kies balzamo sola estis rimoj
ĵonglataj en la cirko verd-arena.
Kaj tiel pasis jaroj kaj jardekoj
kaj ĉiu jar' fariĝis pli ĉagrena,
ĝis fine, kiel nubojn de aŭtuno
trabrilas orradio de la suno,
en mian vivon trafis lum' serena:
en societo, kie mi enuis,
min ravis ĉarmo de estaĵ gajvigla
tre bonokula, tre tenermiena,
kaj mia kor' ekfrapis: jen ŝi estas,
la revo, kiun en la kor' mi portis,
la fratineto. Ŝi estis Irena.

Kaj nun mi estas princo suverena
de luo-ĉambro: olda fraŭl' beata,
helpata, konsolata, riparata,
renaskiĝinta en la societo
de mia retrovita fratineto
feliĉodona kaj feliĉoprena.
Kia plezuro legi al ŝi belon,
poemon interpreti aŭ novelon,
aŭ miajn proprajn versojn en hungara,
kaj vidi, ke rebrilas ĝojo klara
el ŝia okulparo belkomprena.
Kion ne donis la infana aĝo
al mia koro stulte sopirema,
por mi, oldul', ne estas plu miraĝo:
fratina mildo kaj fratina ĉarmo,
fratina viglo kaj fratina varmo,
fratina kiso de fratin' Irena.

LA SPEGULO

Sur stratoj or-aŭtunaj tra vigla svarm' de homoj
mi vagas nostalgie, sencele, kun revemo
en la kvartalo, kie mia malnova memo,
la knabo pale blonda loĝis en oldaj domoj.

Dum hela tag' min hantas revenaj tombfantomoj,
la sojlojn tre konatajn repaŝas mi kun tremo,
kaj tordas mian koron trista, sufoka premo:
la homojn mi ne konas, forgesis min la ŝtonoj.

Al la river' mi iras provi, ĉu pli kompata.
Knabkorpon mian naĝe ĝi muldis, mild-ondbata.
Hezite mi kliniĝas super la ondspegulo,

sopirserĉante kelkajn el miaj trajtoj knabaj.
Ve, la spegul' redonas vizaĝon de fremdulo,
l' iaman bildon prenis ondoj kaj jaroj rabaj.

K. Kalocsay

La „Okcidento" de Tárkony

Apartan lokon en la „Soifo" de Tárkony okupas la kvar grandaj odoj pri la ĉielaj regionoj: Okcidento, Oriento, Sudo, Nordo. Ili aperis unue en Literatura Mondo (1947. 1.), kaj montris, ke la poeto klopodas liberiĝi de sia soleco kaj ĉirkaŭpreni la tutan globon per sia ama atento. Tiun turnon ankaŭ li mem emfazis per tio, ke li enkondukas la ciklon, en kiun li envicigis la kvar odojn, per la poemo „Haŭtŝanĝo".

El la kvar odoj tri aperis senŝanĝe en la „Soifo", sed unu el ili, „Okcidento", ekstreme plivastiĝis, fariĝis la dekoblo de la unua versio. La historio de tio estas, ke la poeto dume enamiĝis al la tririmoj kaj en ties kvarversaj strofoj li prikantis siajn tagojn, la „profanajn gracojn" de la vivo, siajn „antikvajn amatojn", grekajn mitojn ktp., kaj krome ankaŭ multajn el siaj ŝatataj aŭtoroj, muzikistoj, pentristoj, filozofoj. Tiel amasiĝis granda materialo, sed kiam li kolektis kaj redaktis ĉi lastajn pecojn, li sentis, ke ili iel disfalos, se ilin li ne povos kvazaŭ surfadenigi. Nu, konvenan fadenon por ilia interkroĉo li ne devis longe serĉi: kiel tia proponiĝis la odo „Okcidento". Li ne transprenis en ĝin tiujn tririmojn ŝenŝange, okaze li iom ŝanĝis aŭ plivastigis ilin, tamen ilia originala formo ankoraŭ estas bone rekonebla en la versoj pri Milton, Händel, Rousseau, Voltaire, Mozart, Goethe, Beethoven, Victor Hugo, Heine, Baudelaire, Wagner, Verdi, Verlaine, Rimbaud, Heredia. Certe li enfandis ankaŭ tririmojn pri aliaj, sed ĉe ili la originala formo jam apenaŭ estas rekonebla.

La poemo komenciĝas per ok versoj, kiuj kantas la belon de la plej proksima okcidento, la transdanube kuŝanta landparto, la iama Panonio. Tiuj ok versoj, en kiuj „vokas sorĉe al la supla verdablua harmonio kara panjo Panonio" estas tiel sensoflataj, ke ili kvazaŭ solviĝas en la buŝo kiel delikataĵo.

Entrepreninte la grandegan taskon al si difinitan, la poeto devis baldaŭ konscii, ke li kondamnis sin je ekstrema koncizo. Komence li ne prenas ja tion tro severe, ekzemple permesas al si memori pri la Maria-kulto en plena strofo laŭa al Stabat Mater, sed tuj poste la gotikon li jam karakterizas per la admirinda koncizo de du versoj:

Turbrakoj ĵetas ŝaŭmajn
ŝtonopuntojn
en preĝ' ogivofebra al ĉielo.

Tamen, li rekonas ankaŭ la alian flankon de la mezepoko krom la mistika kaj asketa, ĉar

Abaton Adam gloras la vinkelo
kaj grasaj fabloj gruntas
ridrikane.

La renesancon li revokas per tio, ke li rakontas pri ĝi en formo heksametra, sed al Petrarca li dediĉas tutan soneton. Analoge, li memoras pri Villon en formo uzata de li en liaj baladoj. Belaĵojn kaj kruelaĵojn de tiu tempo vicigas la longaj versoj heksametraj, sed por vario enestas kurtversaj strofoj pri Gutenberg, Koperniko, Rabelais, kaj inter la okazaĵoj serenaj kaj sangaj re- kaj revenas, jen jubile, jen ironie la frazo „Ĉie sonas madrigaloj".

Tiun parton finas soneto pri la franca renesanco. Mi opinias, ke ĝin, kun detala komentario, oni povus uzi kiel instruilon pri tiu poezia periodo.

La kontraŭreformaciaj-barokaj tempoj estas skizitaj en kvinjambaj stancoj uzitaj de Ariosto kaj Tasso, sed tiu ludema formo probable ŝajnis al la poeto tro leĝera por la peza temo kaj tial la du lastajn versojn li plilongigas en aleksandrojn:

Kaj brulas — pensi estas denove
riska revo —
ŝtiparoj en Madrido, en Romo, en
Ĝenevo.

Kompreneble la „oran jarcenton" de la hispanoj kantas versoj oktrokeaj, kiajn uzis Lope de Vega en siaj dramoj; en tiuj 28 versoj delikate miksiĝas admiro kaj ironio. Sed dum al Lope de Vega li dediĉas nur du versojn:

Dram- kaj versnababo Vega
mondmiraklo kaj Fenikso

tre malfacile li povas forŝiriĝi de Shakespeare, pri kiu li kapablas diri fabele multe en 13 blankversoj, kaj de la nederlanda pentro, precipe de Rembrandt, pri kiu li donas preskaŭ plenan biografion en 6 versoj sorĉe kondensitaj kaj streĉe trasentitaj. Inter tiuj du granduloj, kvazaŭ timiĝinte de troa longo, li elvokas ŝatatan muzikiston nur per unusola, sed grandioza verso:

Klar-obskurojn monumentajn
majstro Monteverdi muzikas.

Ankaŭ mi mem estas timiĝinta: la poemo havas dudekunu paĝojn kaj mi atingis nur ĝis la oka. Mi ne povas do komenti ĝin tiel detale, kiel estus dezirinde, mi povos atentigi nur pri io kaj alio. Kiel reveke ĝi povas, ekzemple, prezenti al ni la antaŭrevolucian Franclandon, la germanan, anglan, francan romantikon, la rean kaj rean ekbrulon de la herezarevolucia fajro ekde la albigensoj tra la taboranoj, sileziaj teksistoj kaj aliaj ribeluloj, utopiistoj, filozofoj ĝis la scienca socialismo! Altiĝas antaŭ ni la du gigantoj. Tolstoj kaj Dostojevskij. Mi jam signis la nomojn, kiujn prilumas tririmaj aŭ plilongaj strofoj, sed ankaŭ tiuj elpaŝas el la poemego vive kaj plene, kiuj ricevis malpli da spaco. Por ekzemplo, mi delogiĝas citi, kiel estas pentrita la portreto de kvar romantikaj muzikistoj per tiom malmultaj, tamen tiel magie multparolaj peniktuŝoj:

En Schubert nostalgioj al la lontano merlas,
Chopin parfumajn tristojn, dramojn, ribelojn perlas,

Mozaiko pri Lajos Tárkony

„Liaj (kritikistaj — Red.) kriterioj rifuzas legolibrajn starpunktojn kaj mezurilojn en esperanta literaturo kaj postulas la enhavan riĉon kaj artismon; ankaŭ al la recenzistoj li akre ripcoĉas pro ilia malvarmeca rilato al la verkoj, kio kaŭzas nesufiĉan intereson ĉe la publiko... Liaj poemoj tre similas al pentraĵoj; liaj vesperoj, lunlumoj, pinoj kaj ĉefurbaj strataj murmuroj tre ofte efikas kiel kolormolo aŭ tonbunto de impresionistoj..."

(Drago Krajl en Kvar prelegoj pri la esperanta literaturo, 1960)

„Ĉu nomi lin polurita romantisto? Pli facile diri, kiel ne nomi lin. Certe li estas tro ŝveba por esti realisma kaj tro tera por esti idealisma. Li estas li mem; oni povus eĉ diri, ke li estas troe li mem: almenaŭ tiel forte li projekcias sian solecon sur la aĵojn, kiel forte la aĵoj en li speguliĝas. Ankaŭ el la okuloj de liaj amataj estaĵoj elrigardas li mem aŭ lia revo pri li mem: tiuj personoj teksitaj el juna freŝo, fea bluo, miela blondo kaj miraĝa ŝvebo estas lia memsopiro kaj memidealo neatingeblaj."

(Kálmán Kalocsay antaŭparole al *Soifo*, 1964)

„Pasia amanto de la belo, diskreta, sed funde lirika temperamento, li prikantas intimajn emociojn, poezion de ĉiutago, pentras grandajn freskopoemojn pri la kvar mondregionoj, rerakontas antikvajn mitojn, rezignacie inventaras la pasintajn belaĵojn de la vivo, ĉion ĉi en la plej pura lingvo delikate cizelita."

(K. Kalocsay—P. Balkányi—H. Vatré en *Gvidlibro por supera ekzameno*, 1966.)

„... Laŭ mia opinio lia arto plej alte atingas en iuj el la sonetoj lastparte de la libro (*Soifo* — Red.), kie senca kompakto plenigas kontentige la elegantan formon. Ĝenerala trarigardo de la tuta Tárkony nepre kondukas la leganton al la justa konkludo, ke ja temas pri unu el la plej gravaj poeziaj verkoj en Esperanto ĝis nun.

(Baldur Ragnarsson recenze pri *Soifo* — *Esperanto*, 1965)

„La formo de Tárkony estas forte lirika kaj principe fiksa. Li egale virtuozas per soneto, robajo, tririmoj, japaneskoj... Sole pro sia unika formriĉo kaj senbrida lingvo Tárkony legindas, sed pro sia poezikrea formato — inter la plej grandaj spite al laŭnatura pesimismo — li simple legendas."

(Poul Thorsen recenze pri *Sofio* — *Norda Prismo*, 1965)

„La tieaj (en *Dekdu Poetoj* — Red.) estas ekzemploj de forma perfekteco, apud ekzemploj de senpere lirika esprimo per liberaj versoj. Tárkony havas preskaŭ muzikan senton por la ritmo. Li estas poeto de ĉiutagaj, momentaj okazaĵoj, sed ankaŭ de emocia kunsento pri tuthomaraj problemoj, kiujn li projekcias tra sia esence lirika personeco.

(Tazio Carlevaro en *Esperanto en Perspektivo*, 1974)

(Kompilis: V. B.)

---

kanono florkaŝita. Per fajroj dolĉe feaj
Mendelssohn pitoreskas. Kun fabelregnokreaj
tonoj revadas Schumann en fantazi-arbaro,
karnavalbunta princo...

Similajn partojn mi povus citi pri la rokoko, pri la klasikismo, pri la impresionisma pentro, pri la figuroj de la deknaŭjarcenta literaturo. El la dudeka jarcento, kiun la poeto nomas „trodensa, tronebula troproksim" aperas antaŭ ni ankoraŭ la prilumitaj figuroj de Proust, Thomas Mann, Rilke, George, Apollinaire, García Lorca, sed poste „la okuloj oldas jam por plua vid'". La nebulo ŝajne densiĝas en tohuvabohuon, el kiu aŭdiĝas nur „dada-henoj", ĉar „grincas la muziko de la sferoj neniu oleas la akson de la astroj".

La poeto kompatas Melpomenan, kiu elsangas vundite de la ruboj de l' rompiĝinta mondspegulo, kaj, kiel Hamlet, li sendas for Ofelian, ne en la klostron, sed en la kinejon.

Oni povas opinii, ke la poeto estas tro severa pri la nuntempa literaturo kaj arto, sed tio estas lia rajto suverena.

Escepte de tio, la poemego estas vera enciklopedio de la eŭropa kulturo ekde la mezepoko. Enciklopedio aperta por tiu, kiu funde konas la trezorojn de nia kulturo; tia leganto plezuros legi en tiel alloga formo pri siaj kulturaj amatoj kaj revivi en sorĉe revekaj poeziaj bildoj nian kulturhistorion. La malpli orientita leganto kompreneble ne komprenos ĉion senmanke: li devos uzi la glosaron, kiun la poeto metis librofine kaj elserĉi la sciendaĵojn pri pluraj nomoj en literaturaŭ arthistorio. Tiamaniere li ne progresos rapide en la legado, sed se li ne domaĝos la penon de tia tralaboro, li devos esti danka al la poemo, ke ĝi tiel ĝojinde vastigis lian spiritan horizonton.

Bukedo de la redakcio

La poemo de Ludmila Jevsejeva pri Tárkony komenciĝas jene:

Ĉe via foto, Lali Blond,
Aromas blanka hiacinto.

Mozaikon pri Lajos Tárkony mi povas skribi tial, ĉar ni kunestas preskaŭ ĉiusabate ĉe Kalocsay. Inter la sabataj vizitantoj la plej modesta kaj silentema estas li. Nur malofte li fariĝas parolema, kiam kun briliĝintaj okuloj li rakontas pri ĵus legita romano, ĵus vidita filmo, ĵus traplezurita poemo, aŭ pri siaj aventuroj en la oficejo, kie li laboretas por plussalajro krom sia pensio, inter grego da junaj kaj maljunaj knabinoj lin ĉirkaŭantaj kun malespera afableco. Tie li kolektas ankaŭ anekdotojn, sed pri tiuj mi prefere silentas. Nia poeto cetere ne estas tro dorlotata de la sorto. Ofte turmentas lin malsano, jen vera, jen imagata, ofte premas lin lia zorge gardata soleco, kiu kompreneble ligas ankaŭ la melankolion emanantan el liaj poemoj. Kelkfoje li parolas pri sia baldaŭa forpaso — iom poze — sed pli rezigne ol ribele. Por la eksctera juĝanto do nia amiko Lajos ŝajnas pasivulo. Tiun opinion tamen refutas liaj verkoj, ekzemple lia moviĝema „Revuo de Revuoj". Kion do diri por konciza karakterizo? Nu, li ŝajnas al mi kvazaŭ senmova, mildabrila stelo kompare al Kalocsay, kiu, kun sia dinamika naturo, estas kiel kometo.

Ankaŭ mi liriku finante:

La grizan kapon, kara Lali Blond,
Dece girlandas al vi laŭra frond'.

Ada CSISZÁR

LA PLEJ MODESTA

Mi estas redaktoro de Hungara Vivo ekde 1969, de tiam mi laboras kun Lajos Tárkony. Kompreneble jam antaŭe mi konis lin persone, iomete la talentan poeton, liajn du (bedaŭrinde nur du!) volumojn, la anon de la Esperanto-Akademio, sed pli profunde nur en la lastaj jaroj.

Tárkony ĉiam ĉeestas en la redakciaj kunsidoj, sed ankoraŭ li neniam parolis al la diskutitaj temoj. Eble tial povis okazi, ke kiam ni dividis la ĉefajn rubrikojn, Tárkony restis sen kroniko. Tiam venis en mian kapon, ke ni devus publiki regule ankaŭ raporton, kritikon pri la gazetaro de Esperantujo. (Mi jam legis liajn elegantajn eseojn kolektitajn en la libro „De paĝo al paĝo". Sed dum nia unua redakcia kunsido la libroj jam trovis kritikiston!) Tárkony sen hezitado akceptis mian peton, tiel li komencis verki numero post numero sian rubrikon „Revuo de revuoj". Kaj kio okazis? — La duaranga eblo fariĝis ne nur unu el la plej ŝatataj paĝoj, sed laŭ ĝia eleganta stilo kaj sprito la plej altnivela.

Krom sia rubriko Tárkony sen malinklino volonte akceptadas aliajn petojn, traduki novelojn, eĉ anoncojn. Kaj kio okazas? — Liaj prozaj tradukoj estas ĉiam modeloj por tio, kiaj ebloj kaŝiĝas en nia lingvo kaj kiamaniere oni devas transplanti novelon aŭ anoncon en Esperanton.

Kio povas esti la konkludo?-Esencaj karakterizaj trajtoj de homo estas ne la vortoj sed la agoj. Kapablas gardi la memoron de homo ne la paroladoj, sed la verkoj, pensoj, la spirito, kiu radias el sia tuta vivverko. Kaj al la vera famo sufiĉas eĉ unu volumo, ĉar en la literaturo gravas ne la kvanto, sed la kvalito.

Mihály GERGELY

*

Malfacile estas difini miaflanke, kion mi ellevu el lia multflanka personeco: la poeton, la tradukartiston, la recenziston aŭ la akademianon? Li kreis kaj kreas ankaŭ nun grandiozan en ĉiu sia agado. Tamen mi aprecus pleje lian tradukistan laboron. De kiam mi aŭdis interesan difinon pri la laboro de la tradukartistoj, mi speciale alte taksas ĉi tiun agadon de Lajos Tárkony. Laŭ tiu difino artnivele traduki estas: danci en katenoj. Vere, kiuj konas la arton de la tradukado, tiuj scias, ke tiu difino estas tre sprita kaj trafa, ja transplanti poemon en alian lingvon, konservinte la originalan formon kaj rimformulon: tio postulas pli da kapablo, ol krei novan verkon.

Nia Lajos Tárkony vere „dancas" majstre inter la implikaĵoj de la vindkatenaj tekstoj kaj ni esperas, ke li ankoraŭ longe fruktuzos sian „dancemon" por la bono de ĉiuj esperantistoj literaturemaj.

István LÁSZLÓ

KARA AMIKO TÁRKONY!

Per miaj jenaj linioj mi intencas rememorigi al vi la fruajn tempojn, kiujn ni kune travivis. Mi pensas pri la zorgoplena, sed glora epoko de la unua Literatura Mondo, kiam ni kune kun nia kara Kalocsay kaj la neforgesebla Karlo Bodó priparolis problemojn de la stilo kaj gramatiko de Esperanto. Kalocsay tiam ellaboris sian vortfaradan sistemon, kies unuaj skizoj aperis en la internaj kovrilpaĝoj de la Literatura Mondo en multaj daŭrigaĵoj.

Ĉu vi rememoras, kiom modestaj ni estis kaj devis esti tiutempe? Kiel ni ĝojis pri malgrandaj paŝetoj de la movado; pli ol pri la grandaj paŝoj de Esperanto en la nunaj tagoj!

Vi jam estis tiam signifa poeto. Tion ni ne menciis, kiam vi ĉeestis, sed malantaŭ via dorso — kaj tiaj laŭdoj estas la plej valoraj.

Nun mi volas konvinki vin, ke vi bone laboris; ke vi efike agadis je nivelaltigo kaj evoluigo de nia trezoro — nia lingvo.

Nun ni refoje laboras kune. Kaj mi sentas favoro de la sorto, ke mi povas agadi kune kun vi por nia komuna celo — la venko de la internacia lingvo Esperanto.

Amike salutas vin:
L. LESZNAI

Lajos Tárkony:

Nikolao Hohlov: La Tajdo*

„De la musique avant toute chose...” — jen la moto de la poemlibro de Hohlov. Ĉu prave? Ĉu vere oni trovas en ĝi „muzikon antaŭ ĉio”, sentimentojn apenaŭ ilustreblajn per vortoj, korespondojn nemotiveblajn, eternan muzikon de efemere forglitantaj momentoj? Ĉu la aŭtoro estas disĉiplo de Verlaine?

Mi devas kontraŭdiri. Certe, multfoje nin kaptas dolĉe muzikaj sonoroj en ĉi tiuj versoj, sed la muziko en ili ne estas „antaŭ ĉio”. Ĝi estas sole subpentro de tre klare esprimitaj sentoj, tre akre konturitaj pensoj. Kaj kelkfoje la poeto ekbatas la kordojn krude, por akordoj laŭtaj kaj akraj, kvazaŭ alarmo aŭ veokrio.

„La lirikon mi ne kreas, min *obsedas* la liriko...”

diras la poeto pri si mem. Kaj la unua vorto, kiu venas sub mian plumon parolante pri li, estas la vorto *obsedo*. Nun mi ekmemoras, ke ankaŭ Kalocsay skribas en sia rondelo pri li:

„La himnon karnan kun pasio
Obsede kantis al ĉiel'...”

La obseda sopiro pulsas en ĉi tiuj poemoj. Sopiro je amo ĉasta kaj fidela, je amo flagra kaj volupta, je la rompiĝinta pasinto, je la marmore perfekta, neatingebla belo, je la grandaj homaj idealoj. Kaj ankaŭ ia obseda melankolio sidas sur tiu ĉi spita animo. Kaj la *tajdo* de lia poezio alfluas kaj refluas inter sopiro kaj rezigno, idealo kaj karno;

Mi levas mian kapon en ĉielon,
Sed per piedoj staras sur la ter',
Nur idealojn vidas kiel celon,
Sed nutras min la krudreala ver'.

Sur montoj kreskas mia sorĉa
floro,
Sed en la valoj kreskas mia pan',
Altiras la animon ĉiu foro,
Sed ankre tenas ĝin la karna
man'.

Kaj ĉi tiu tajdo, kiel li mem priskribas ĝin en la unua poemo, per senĉesaj ondobatoj sieĝas la rokon de lia animo. Kaj la ŝaŭmbolon de la batalaj ondoj akompanas „karmanjola fajfo de l' siroko kaj demoneca rido de l' siren' ”.

Delikata, sed intensa erotiko vibras en la liriko de Hohlov. Ĝi estas universala inundo de l' seksa sorĉo, en kiu forviŝiĝas la limoj inter karna sopiro kaj esteta plezuro, en kiu korpo kaj animo sin lasas porti senreziste per la potenca vivrivero — fluanta en la morton. Eble plej klare oni sentas ĉi tion en la Luna Ebrio**, kie la sorĉo simbolas la lunatikecon de la eterna amtento:

Jen — ĝi brilas, mia luno,
Virgomaska amlucerno,
Nuda mamo el latuno,
Iritilo de l' eterno...

Jen — ĝi trenas, pala torĉo,
Tra l' cipresoj ombran langon —
Kaj la tero sub la sorĉo
Paroksisme versas sangon.

Jen — ĝi tiklas kaj sufokas,
Estingante ĉiun honton,
Jen — ĝi vokas, laŭte vokas:
Serĉu, kaptu kunĝuonton.

Vivajn korojn ligas pare
La magia lunsonato
Por oferi suraltare
Al Eroso kaj Hekato.

Alifoje la sopiro je esprimo, kvazaŭ la erotiko de vortoj, la ebrio de meminterpreto diktas al li versojn, kiuj frapas niajn vangojn kvazaŭ spirego de ekstazo:

Miaj strofoj volus vindi sveltajn
formojn de Venuso,
La plastikon de statuoj de l'
antikva kulta bel',
Bronzan nudon de la landoj,
simbolitaj per lotuso,
Fantazian eldoradon de la ravo
kaj fabel'.

Mian himnon al la karno, al
patrino de l' spirito,
Kantas ĥore la plej lumaj
anguletoj de l' anim'...

Alifoje la rezignacio pri la unua amo, pri ĉi tiu „unika floro”, diktas al li amaran spiton, vipajn vortojn kontraŭ si mem: ridinda Ahasvero, kiu vane serĉos la dolĉan animekvilibron de la unua feliĉo, vane pelos ĝin tra venenaj kisoj, delogitaj viktimoj, kalikoj vinaj kaj absintaj, „vizaĝoj kaj vizaĝoj kaj ciferoj”:

Ĉi tiuj „vizaĝoj kaj vizaĝoj kaj ciferoj” tamen eksonigas kordon tie kaj tie ĉi sur lia liro. Kaj, malgraŭ la iom kurblipa admiro al ĉi tiuj pasemaj idealoj, momentaj ekplaĉoj, lia fantazio vestanta ĉion per belo, ĉiam trovas pri ili kelkajn frapantajn, kelkfoje ĉarme petolajn versojn. Eĉ du neforgeseblajn poemojn. La unu estas La Karnavala Romanco, kie tra la triviala ĵazbanda tumulto de la dancantoj pasas fiera belulino, kvazaŭ vizio de marmorbela greka diino, kiun li

sekvis rigarde, sen dezir', sen
espero,
Kun la mano rigida ĉe l'kor'.

Kaj la alia — la Vintra Fabelo, ĉi tiu hela, sonoriltinta idilio sub la frostbula vintra ĉielo en la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo, kie

...(li) veturas, aventuras, la
ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad'.
En sereno de l' ebeno malaperas
la fadeno
De la glata vintra voj',

Mia Nita, am' subita, de la frost' ebriigita
Alpremiĝas en la ĝoj' . . .

. . . kaj tiel plu, ĉiam kresĉende, ĉiam pli vigle, pli freŝe, pli muzike, ĝis la fino:

Unu suno, unu juno, la unua febra kuno
Kaj magia stelpoem' . . .
Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita
Ĉion kronas per alprem'!

Kaj tamen — li sentas sin ekzilita en la mondo de la natura ĝojo de knabino; li vivas ermite en sia propra mondo, al kiu lin ne povas gvidi vojo. En ĉi tiu transcenda mondo li eble ĉiam ankoraŭ provas larmverŝe revivigi tiun „unikan floron" velkintan. kaj, (en la koro — amara obsedo. en la haroj — tro frua arĝent) li demandas sin:

Kial longe li sidas vespere
Super iu malnova portret',
Kaj, statue-senmova ekstere,
Perdas larmon en peza kviet'?

Kial nokte marŝadas sur strato,
Kun kolumo levita, sen cel',
Per la paŝoj de hom-aŭtomato,
Sub albrove tirita ĉapel'? . . .

Sed subite kia pugnobato sur la kordojn! Jen, „el nekonataj, ŝlimaj abismoj de l' animo" kantas la bardo en nia epoko. La tempo ne favoras la poezion. Baraktas la mondo! Kaj la poeto, kies liro estis agordita por milda, mola muziko de jen melankoliaj, jen petolaj sonoj de la sentema memlirико, nun estas obsedita de la komuna mizero, kaj antaŭ liaj febraj okuloj fantomaj vizioj galopas for: sangaj standardoj, falintaj gilotinoj; lin inkubas grincado de dentoj, metalo de fanfaroj, stertoroj, veoj, lamento de ploristinoj:

Analojn postlasitajn de gentoj kaj prauloj
Mi sentas en angoro tra tempoj kaj nebuloj,
Antikvaj krimoj pete al ni etendas manojn
Kaj forgesitaj lingvoj malbenas la tiranojn . . .

La tuta, senĉesa sinsekvo de krimoj, kiun oni nomas mondhistorio, inkubas en la tondraj strofoj de poemo *Eŭropo*. Kaj montrante per fingro al la nuda „krimulin' Eŭropo" li elkrias, fandante ĉiujn malproksimojn en profeta ekstazo:

Aŭskultu do, Azio, mamnutristino nia,
Afriko sfinkse muta, tribar' Oceania,
Ĝemela kontinento de ambaŭ Amerikoj,
Kunfratoj de l' estonto kaj dumaj malamikoj
Aŭskultu kaj konfidu la jam proksiman horon . . .

Ĉi tiu grandioza poemtrombono estas unu el la plej potencaj Esperantaj poemoj!

* * *

Granda promeso kaj multa plenumiĝo estas tiu ĉi volumeto. La aŭtoro sentas la lingvon en la pulso, perfekte estras la formon, liaj ritmoj estas freŝaj kaj sane pulsantaj, liaj rimoj estas novaj kaj ofte surprizaj. Li havas freŝajn ekpensojn, plaĉajn metaforojn. Kiu ne sentus agrablan eksciton, kiam li parolas pri „mentodora kaj karese dolĉa vento", kiam en sia belega poemfresko „Duelo" li malkovras en la skermanta virino „mikson el tigro kaj mimoz' ", kiam li pasas tra la valo al la „lazura, sonvelura pastoral' ", kie lin ĉarmas:

Fragoj, framboj, ciklamenoj,
Mentoj, kvastoj malvaj,
Inter alnoj kaj fraksenoj
Grizaj rokoj kalvaj,
Fringoj, fringeloj,
Pepaj kvereloj,
Zumeta bruo —
Paruo!

Aŭ kiam li vizias por si la mortintan Sappho:

. . . Algoj ornamas la harojn, konkoj surŝutis la bruston,
Kaj sur la liro rigida fingroj graciaj ripozas . . .

Aŭ kiam kun poeta fiero li diras pri siaj versoj:

Semo hodiaŭ ĵetita arbiĝos, proklamos la vivon,
Super la koro kaptita formante ensorĉan ogivon . . .

Multon tian mi povus ankoraŭ citi, vortojn kaj versojn daŭre restantajn en memoro. Tamen mi devas ne prisilenti, ke ĉi tiuj belaj versoj ofte sidas en malpli bona poemo. Ĉi tiu volumo estas la unua volumo de la aŭtoro, kaj li ankoraŭ ne tute lernis *fari* la poemojn. Kie lia inspiro sufiĉis nur por sola ekpenso, aŭ por nuda temo, tie ne ĉiam li povis krei al ĝi la tute egalvaloran kadron. Tiu manko de kompleta prilaboro restigis ekzemple en la Luna Ebrio la superfluajn strofojn, malpliigis la ĉarmon de la Roza Ordeno, Maltrafa Pafo, Blua Kiso, Respondo. Sed kie li ne bezonis garnaĵon, ĉar la potenca inspiro sufiĉis por la tuta poemo, trenante kun si la poeton nekontraŭstareble, tie la poemoj estas vere neforgeseblaj travivaĵoj de la esperanta versleganto. Mi citu el ĉi tiuj perloj: Chante-claire, Sur la Slijeme, K. de Kalocsay, Dies irae, Al Julio Baghy, Duelo, Mia vojo, Karnavala Romanco, Vintra Fabelo, Eŭropo.

* * *

Konturojn de interesa kaj profundsenta poeto rivelas ĉi tiu volumeto. Ĉi tiujn konturojn, kvazaŭ trabaron de granda kaj bela konstruaĵo, sekvantaj volumoj devus plenigi per brikoj, statuoj kaj freskoj. Ĉu ni ricevos ilin?

La poeto silentas. Li elkriis sian saluton al la heroldo matena:

Poeto kaj koko anoncu alvenon de ĉiu aŭroro!

Estas mallume en la tuta mondo. Plumba dormo ŝtopas la orelojn ĉie. „Tro frue, tro frue vi krias, ankoraŭ forestas la lumo, eĉ unu radio ne strias!"

„Egale! Li kriis tiam al la „gaŭlo orpluma."

Kaj nun?
Ĉu falis la trulo el lia mano?

Ĉu, kiun tiel verve li komencis, eterne stumpa restos lia

„Monumento postlasita sur la vojo el Eden' "?

ATTILA JÓZSEF

SALUTO AL THOMAS MANN

Kiel infano jam ripozi vola
kaj jam kuŝanta en la lito mola
petas: fabelu, restu apudlite
(tiel la nokt' ne frapos lin subite),
kaj dum koreto lia ege batas,
li mem ne scias, kion li pli ŝatas,
ĉu la fabelon, aŭ ke vi kunestu:
ni petas vin, sidiĝu, kun ni restu,
rakontu nun, kiel al vi kutime,
fabelu, ke kun ni vi 'stas intime,
kaj kun vi ni 'stas, ĉiuj alvenintaj,
havantaj zorgojn al la homo indajn.
Poeto ja ne blagas trivialon,
la veron diru, ne nur la realon,
la lumon, ke eklumu cerboj niaj,
ja ni obskuras unuj sen aliaj.
Kiel Castorp tra korp' de dam' Chauchat,
tiel ni vidu nin mem tra kaj tra.
Nun via softa voĉ' en bru' ne dronas,
fabelu, kio belas kaj malbonas,
funebron igu ĝis dezir' elani.
Jus ni sepultis povran Kosztolányi.
Kiel kancero lin, humanon pluraj
ŝtatmonstroj nun maĉadas plej teruraj,
kaj ni hororas, kiom pli da veoj
nin plagos, pli da novaj lup-ideoj?
Ĉu bolas nova venenaĵ' murdega?
Ĝis kiam eblos por vi lok' prelega?
Sed temas, ke nin lacajn, viaj diroj
stimulu, ke ni, viroj, estu viroj,
virin' estu virin' — libera, kara,
kaj ĉiu estu hom' — pli kaj pli rara.
Sidiĝu do, komencu belparole,
ni vin aŭskultos; estos kiu sole
rigardos vin kun ĝoj' en la okuloj,
vin, eŭropanon inter blankhaŭtuloj.

Tradukis: L. TÁRKONY

La saluton la poeto intencis reciti kiel enkondukon al la prelega vespero de Thomas Mann en Budapeŝto, la sepan de januaro 1937, sed la Horthy-reĝima polico malpermesis ĝian prezenton.



La juna kunlaboranto de Literatura Mondo en la tridekaj jaroj — Desegnis István Barta

LAJOS TÁRKONY

PETUNIO

Sub mia fenestreto arbeto petunia
per siaj ĉielbluaj petaloj pale pompas,
parfumon dissendante tra la vesper' junia,
dum la krepusko sian hararon brunan kombas.

La milde ĉielbluaj petaloj pale pompas,
en kampoj trajnobruo formortas, klaketanta,
vesperkrepusko sian hararon brunan kombas,
flutetas voĉ' de griloj, melankolio kanta.

En kampoj trajnobruo formortas, klaketanta . . .
Mi kvazaŭ min retrovas en brakoj de l' patrino.
Flutetas voĉ' de griloj, melankolio kanta.
„Ho mia fil'!" — mi aŭdas en dolĉa halucino.

Mi kvazaŭ min retrovas en brakoj de l' patrino,
tia trankvilo regas nun en interno mia.
„Ho mia fil'!" — mi aŭdas en dolĉa halucino . . .
Odoras subfenestre arbeto petunia.

CHARLES BAUDELAIRE

LA MORTO DE L' ARTISTOJ

Ĝis kiam do burleski per sonoj klaŭn-tintilaj,
Ĉe l' streta frunt' vin kisi, trista karikaturo?
Por trafi al la celo de mistika naturo,
Saguj'! da sagoj kiom do perdi senutilaj?

L' animon jam eluzos art-fintoj tro subtilaj,
Kaj ni detruos multe da peza armaturo,
Antaŭ ol la Kreaĵon ekvidi en maturo,
Kies dezir' infera ĝemigas nin martiraj!

Estas, kiuj neniam konis sian Idolon,
Kaj ĉi skulptistoj damnaj, portantaj honto-vundon,
Kaj al si martelantaj la bruston kaj la frunton,

Havas esperon solan, morn-strangan Kapitolon!
Ke, kiel nova suno, la Morto sin eklevos,
Kaj de ĝi la burĝonoj de l' cerbo flori krevos!

El la franca: Lajos TÁRKONY

La fotojn sur la 1a, 3a, 10a paĝoj faris Zoltán Fejér

Skiza bibliografieto de la verkaro de Lajos Tárkony

Libroforme:

De paĝo al paĝo (eseoj pri la originala literaturo), Budapest, 1932.
Dekdu poetoj (10 originalaj poemoj), Budapest, 1934.
Hungara Antologio (tradukoj), Budapest, 1934.
F. Karinthy: Vojaĝo en Faremidon (traduko de romaneto), Budapest, 1934.
Ch. Baudelaire: La floroj de l' malbono (tradukoj), La Laguna, 1957.
Soifo (originala poemaro), La Laguna, 1964.
F. Sánta: Dudek horoj (kuntraduko de romano), Budapest, 1966.

Ĉefaj originalaj kontribuaĵoj en Literatura Mondo (LM) kaj La Nica Literatura Revuo (LNLR):

Al moderna knabo — LM 1932, p. 180
Amo — LM 1948, p. 108
Aventuroj — LNLR 1958 (17), p. 162
El la Tririmoj — LNLR 1962 (42), p. 226—7
En hospital-fenestro — LM 1948, p. 49
Febro — LM 1933, p. 91
Frua marto, posttagmeze — LM 1948, p. 67
Infanoj en la hospitalo — LM 1948, p. 48
Japaneskaj fotoj — LM 1933, p. 130
Kosmo — LNLR 1957 (12) p. 214—6
Kvin poemetoj — LNLR 1955 (2), p. 52
La kanto de Ĥarono — LM 1948, p. 134
La kvar mondregionoj (Okcidento, Sudo, Oriento, Nordo) — LM 1947, p. 5—8
La kvindektria jaro — LNLR (17), p. 161
La lumgardanto — LM 1931, p. 207
La spegulo — LNLR 1958 (17), p. 162
La Mistera Insulo — LNLR 1958 (17), p. 163.
Malnovaj sonetoj (Liberiĝo, Sekreto, Sopiro, Renkonto, Manĝigis vi kolombojn, Memoro, Aŭtuna sunradio, Krepusko) — LM 1947, p. 105—6
Marto — LM 1947, p. 47
Matena humoro — LM 1933, p. 117
Memoro al Helmi Dresen — LM 1947, p. 50
Mia lito — LM 1948, p. 67
Momentfoto — LM 1931, p. 108
Mozart inter la arboj — LM 1947, p. 85
Portreto — LM 1947, p. 133
Post dek jaroj (Abiturienta datreveno en la piarista gimnazio) — LM 1947, p. 174
Post dimanĉa pluvego — LM 1948, p. 67
Siringo-florado — LM 1948, p. 109
Soifo — LM 1947, p. 69
Triopa trista gard' — LM 1931, p. 186
Vespera sopiro — LNLR 1958 (17), p. 163

Prozo:

Al la vera vizaĝo de Goethe — LM 1932, p. 61—2
Budapeŝta Kristnasko, 1944 — LM 1947, p. 164—6
Edmond Privat, la poeto — LM 1933, p. 177—9
Kelkaj vortoj pri la „originala manio" — LM 1931, p. 120
Pledo por literatura organizo — LM 1932, 93—4
Pri la Svisa Antologio — LM 1947, p. 23—7
Valéry Larbaud — LM 1931, p. 122—3

Kritika literaturo pri li:

K. Kalocsay: Lajos Tárkony — Hungara Vivo 1962/4
V. Benczik: Soifo (recenzo) — Hungara Vivo 1965/2
B. Ragnarsson: Grava poezia verko el Budapest (recenzo pri *Soifo)* — Esperanto 1965, p. 53
P. Thorsen: El fonto amara (recenzo pri *Soifo)* — Norda Prismo 1965, p. 68
V. Benczik: Lajos Tárkony 70-jara — Hungara Vivo 1972/2

(Kompilis *Maria BENCZIK*

La verkaro de Lajos Tárkony inspiris ankaŭ la stil-parodiiston Henri Baupierre Jen, kion montras a kurba spegulo:

Demandoj

Ĉu frumaten' ekgrizas? Ĉu pro neĝosordino
la bruaj trafikondoj ankoraŭ ne tumultas
tra la kanjon' grandurba? Enpense mi aŭskultas
la tintan kalkantakton de fora pasantino.

Ĝi hantas la solecon de mia litintimo
kiel gut' regulbate en korpelvon singultas,
dum memoro dolora mian memon envultas
kaj min sufoke premas minaca halucino.

Ĉu l' juna blonda knabo, kiu iam enlitis
de mia flank' molŝove sed perfide forglitis?
La ŝutrojn mi apertas kaj sondas iluzie

la vatan blankon strate. Min kaptas tuj ekdubo:
El jam mil paŝostampoj kaj vetursulkoj, kie
la spuron nun retrovi de l' kapreola bubo?

LAJOS TÁRKONY

MOZART INTER LA ARBOJ

La ĝardeno eksilentas.
La aero
de l' somervespero
gustas tiliflormiela.
Kaj ekatentas
amaso milorela.

Kaj ekŝvebas fragilaj,
papiliflugilaj
perlamotbrilaj
saltetantaj sonoj
de violonoj . . .
Haltas la spiroj!

Ho, homo de mil sopiroj!

Estas ĉi tie belaj, estas ĉi tie turpaj
kaj gajaj kaj tristaj kaj bonaj kaj kulpaj,
paroj amantaj, amikaj,
patroj kun filoj, soluloj stoikaj,
homoj kurbŝultraj
pro zorgoj multaj,
kaj animoj sapvezikaj,
koroj cindriĝintaj de flamo
de malespera amo,
oreloj junaj, kiuj ĉe pordo de mirakloj embuskas,
animoj, en kiuj mortantaj sunoj krepuskas.

Violonarĝento sonora,
anĝelŝtupetaro de harpo,
trumpetkrio jubile ora
flugas de arbo al arbo
de kor' al koro, donaco trezora,
flugas super la sankta ekstazo,
super minuto beate glora
de la amaso
milkapa, unukora!

EN HOSPITAL-FENESTRO

La ĉielo pompas nun per italece bluaj farboj,
kvankam vintro proksimiĝas jam per paŝo plumbo-
planda,
en la park' per febre sekaj lipoj trinkas ĉiuj arboj
la oblikvan ruĝan brilon de la sun' adiaŭanta.

Ho restu, Suno,
kiu en ĉi velkanta aŭtuno
ĉi tien sorĉis nun la lumon, varmon,
printempon, vivoĉarmon!

Ho restu, Sun' brakuma!
Ne lasu, ke min glutu la frostoj kaj tenebroj,
la morna, elektroluma
torturo de la febroj!

Falas la krepuskvualoj, lante pli kaj pli obskuras,
kaj ekbrulas la lanternoj, la ĝardenaj kaj la strataj,
malproksime la vibranta lumo de la tramoj kuras:
tiuj plenas nun de homoj sanaj, viglaj, agmalsataj.

Ho mi, senpova malsanulo!

La tramoj kuras per rapida rulo
al la brilantaj flamoj
de la bulvardoj,
kiom da aktivec', kiom da planoj!
Ho, kiom da klopodoj, luktoj, ardoj!

Atendu, homoj, nur minuton!
Ne ludu sen mi tiun ludon!
En plan' mi estu molekulo,
fajrer' mi estu en la lukto-brulo,
kaj se necese, kamaradoj,
ke por libero kaj futuro ni skermu
(ho min el ĉi futur' ankoraŭ ne elfermu!),
mi ankaŭ estu tie sur la barikadoj!

En la parko, fajfadante iras la vespera vento,
balaadas la foliojn flavajn kun indiferento,
sed sur la novembra frosta firmamento tra l'
malheloj
la mesaĝo muta brulas de la silentemaj steloj.

1948

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

ESPERANTO de UEA (1975. 6.) dediĉas artikolon al *Paul Berthelot,* (1881—1910), kiel al fondinto de la revuo *Esperanto.* Interese estas legi pri la kompatinde aventura vivo de tiu „Marcelo Verema", kiu, skuiĝante inter plejaj ekstremoj, forkonsumis sian vivon en sia 29-a jaro. Sian revuon *Esperanto* li pene eldonadis inter 1905—1907. Grandan signifon la revuo akiris nur en la manoj de *Hodler,* kiam li, transpreninte ĝin, faris el ĝi en 1908 la oficialan organon de UEA. En la sama numero ni povas legi belan kaj bele ilustritan artikolon de *B. Ragnarsson* pri Islando, en kies ĉefurbo *Reykjavik* okazos la U. K. post du jaroj. — La sensacio de la julia-aŭgusta numero estas, ke la ĝenerala direktoro de Unesko, *Amadou-Mahtar M'Bow,* kies tre simpatie ridetanta vizaĝo nin salutas sur la titolpaĝo, sendis mesaĝon al la U. K. en Kopenhago, esprimante sian ĝojon pri tio, ke la organizantoj de la kongreso elektis kiel ĉefan temon la rolon de la virino en la socio. Li eĉ verkis artikolon pri tiu temo por la gazeto. Tio estas frukto de la iama venko de *Lapenna* en Montevideo, sed Lapenna mem ne aŭdis ĝin, ĉar ĝi ne aŭdiĝis ĝis Saarlando, kie *Haupenthal* aranĝis por li vickongreson. Ĉu tio ne estas bedaŭrinda? *S. Milojeviĉ* nomas tiun Saarlandan konferencon „danĝera ludo", kaj fakte ne utilus al nia movado, se oni sukcesus ĝin disŝiri en du partojn.

Pri la BRITA ESPERANTISTO mi devas bedaŭre konstati, ke lastatempe ĝi malgrasiĝis. En la 6—7-a numero mi legis kun intereso la artikolon de *Mary Davies:* „Vizito al Pollando". Tre simpatie kaj simpatiige ŝi rakontas siajn travivaĵojn en la lando, kien ŝi iris kun oficiala subteno por studi la konservadon de historia arkitekturo kaj por pliintensigi amikajn rilatojn. Tre vive ŝi pripentras sian admiron pri la grandioza rekonstrua laboro, per kiu la poloj revivigis siajn barbare detruitajn arkitekturaĵojn en ties originala stilo. Ŝi finas jene: „Elstara estas la lando pro sia traktado de arkitekturo historia, kaj elstara estas la popolo pro sia gastamo". Fakte, la artikolo rivelas bonegan pruvon pri tio, kiel multe E-o estas fruktuzebla ĉe vizito kaj studado de fremdlingva lando... — *D. J. F. Quirke* refortiĝis post kelktempa silento kaj per peza klabo li trabatas la libron „Esperanto en Perspektivo". Mi devas diri, ke li faras tion verve kaj sprite, sed, laŭ sia kutimo, eble ne tute objektive. Mi opinias, ke oni devus eltiri longan ŝnuron inter *Quirke* kaj *F. de Diego* poste difini ĝian ĝustan mezon kaj tie serĉi la veron objektivan.

VENEZUELA STELO (1975. 5.) ĝojigas min per sia persista ekzisto, ĉar tio montras, ke tie la movado stariĝis sur ne malfirmajn piedojn. Surprize bela pruvo pri tio estas ankaŭ, ke en la eldono de la Venezuela E-Asocio aperis sur 260 paĝoj la romano de Gallegos „Donna Barbara" en la traduko de *F. de Diego.* Kaj la gazeto en sia gvidartikolo eĉ avizas la aperon de „Don Quijote" tradukita de la sama F. de D. — La gazeto cetere ne estas ia parada presprodukto, ĝi havas nur 8 paĝojn, el tiuj du paĝojn okupas la prilingvaj artikoloj de *F. Garcia Blázquez.* Li ŝajne volas komenci longan serion da artikoloj prilingvaj kaj en tiuj artikoloj li volas triumfigi la logikon kontraŭ la tradicio. Nu, licu diri, ke tio ne estas sendanĝera, ĉar povas esti diversaj logikoj kaj povas esti, ke iu, obsedite de sia propra logiko, ne vidas la aliajn. Post la enkonduko, en sia unua ĉapitro li pledas por „peti al" anstataŭ la tradicia kaj zamenhofa „peti de". Ties logikecon li volas pruvi per tio, ke „peti" apartenas al la verboj havantaj du objektojn kaj estas analoga al *doni, diri, adresi rakonti ktp.* Ĉe tiuj ĉi verboj la rektan objekton esprimas akuzativo, kaj la nerektan la prepozicio *al.* Sekve se ni diras: „diri ion al iu", ni devas diri ankaŭ „peti ion al iu". Sed, ĉu tiu ĉi logiko estas la sola kaj la ĝusta? Ni rigardu la zamenhofan frazon „Li petis de ŝi trinki" kaj ni transformu ĝin laŭ la aŭtoro: „li petis al ŝi trinki". Mi konfesas, ke mi ne komprenus la transformitan frazon. Krom la logiko de la aŭtoro do devas ekzisti ankaŭ logiko alia. El la specoj de nerektaj objektoj unu signas, ke oni transdonas aŭ volas transdoni ion al ies posedo aŭ konscio: *diri, doni, rakonti, respondi, proponi, oferti* al iu ion. Tio estas la *dativa* objekto, ĝia prepozicio estas *al.* La alia objekto signas, ke oni forprenas aŭ volas forpreni ion de ies posedo aŭ konscio: *peti, demandi, akcepti, ricevi, ŝteli, postuli, pretendi, rabi* de iu ion. Tio estas *ablativa* objekto, ĝia prepozicio estas *de.* La verbo „peti" do ne staras sola, sed estas nur unu el la serio de analogaj verboj. La aŭtoro estas prava, kiam li montras la eblojn de konfuzo, kaŭzatajn de la plursignifeco de la prepozicio *de,* sed malmulte helpas elimini tiujn nur ĉe „peti", nezorgante pri la aliaj verboj de la serio. Ekzemple en la frazo „la libro estis ricevita de Karlo" oni ne povas meti „al Karlo" por esprimi, ke ne Karlo ĝin ricevis, sed de Karlo ĝin ricevis iu alia. Cetere Esperanto jam solvis la problemon: necesokaze oni povas uzi *disde* por esprimi la ablativan objekton.

En OOMOTO (1975. 3—4.) *Eizo Itoo* memoras solene pri la kvindekjara jubileo de Universala Homama Asocio. Mi esprimu mian respekton al la klopodoj de UHA, kiu celas „fratiĝon kaj unuiĝon de la tuta homaro", tamen mi opinias modeste, ke per neniaj misiaj paroloj oni povas fari kolombojn el akcipitroj. La t. n. paca kunekzistado estas malpli alta kaj ambicia, sed pli reala kaj atingebla celo. — *K. Matuba* raportas pri la planlingvo *Zilengo,* la sola planlingvo kreita de japano surbaze de latinidaj lingvoj. Ĝin ellaboris d-ro *Oka* en 1887, do *antaŭ* la Unua Libro de E-o. Estus interese konigi la lingvon detale, sed mi ne volas min altrudi sur la terenon de *E. Vilborg.* Mi diras do nur tion, ke surprize ĝi similas al E-o. Ekzemple la verboj finiĝas per *-as, -is, -os,* sed *-is* signas la prezencon kaj *-as* la preteriton. Jen unu frazo en tiu lingvo: „Ante kinkdek ano za has dudekdu ano e kelk meso". Ĉu vi komprenas?

CHINOIN GÉPGYÁR



fabrikas maŝinojn taŭgajn por strikta pakado
de individuaj kaj kolektivaj pakaĵoj
Se vi havas tiurilatan interesiĝon bonvolu kontaktiĝi kun

HUNICOOP Gépipari Kooperációs Külkereskedelmi Iroda

Maŝinindustria Koopera Kontoro por Internacia Komerco **HUNICOOP**
Ĝi estas volonte je via dispono:

HUNICOOP

H—1062 Budapest, Népköztársaság útja 113.
Telefon: 424-950
Telex: 22-4435



Patrino en Indio — Foto de János Eifert

D-rino Flóra Szabó-Felső

Internacia

Sinjoro Prezidanto, estimataj Gesinjoroj!

Kiam la Estraro de la Universala Esperanto Asocio decidis pri la ĉijara kongresa temo, ĝi celis la akordiĝon kun la intencoj de la Unuiĝantaj Nacioj, kies 27-a Ĝenerala Asembleo unuanime proklamis la jaron 1975: Internacia Jaro de Virinoj. En la praktiko de Unuiĝantaj Nacioj ofte okazas, ke oni dediĉas difinitan jaron al unu grava celo, troviĝanta en la Ĉarto de Uno. En la rezolucio de 1945 en San Francisko oni povas legi interalie: „Ni, popoloj de Unuiĝintaj Nacioj ... decidis restarigi la fidon je fundamentaj homaj rajtoj, dignon kaj valoron de la individuo, egalrajtecon de viroj kaj virinoj, egalrajtecon de grandaj kaj malgrandaj nacioj."

La batalo pro la emancipiĝo de la virinoj jam en la pasinta jarcento estis sufiĉe forta. En la 20-a jarcento, inter la du mondmilitoj, en internaciaj organizaĵoj oni okupiĝis pri tiu demando, kiu estas unu el la esencaj problemoj de la mondo. La Ligo de Nacioj en la dudekaj kaj tridekaj jaroj faris gravajn paŝojn, sed la militeksplodo interrompis tiujn klopodojn. Ankaŭ en la lastaj jardekoj naskiĝis pluraj internaciaj kontraktoj, celantaj helpi la solvon de unu aŭ alia flanko de la problemaro. Mi povus longe paroli pri la historio de la batalo por la virina emancipiĝo, sed tio ne estas mia tasko. Mi nur mencias, ke dum la lastaj tridek jaroj sur la kampo de homaj rajtoj, sendube plej energie evoluis la rajtoj de la virinoj, tamen ne tute kontentige. Ĝuste pro tio en tiu ĉi jaro oni metis la virinojn en la lumojn de la reflektiloj. La gravecon de la afero substrekas la fakto, ke temas pri la duono de la homaro.

Mi certas, ke ankaŭ la partoprenantoj de tiu ĉi kongreso havas tute diversajn opiniojn pri la rolo de virinoj en la socio, en la mondo. Tio dependas de la individuo, de la edukado, de la sociordo, en kiu la persono vivas. Dum la kongreso ĉiuj partoprenantoj havas okazon diskuti pri la temo. Ĝuste la Internacia Lingvo ebligas, ke ni povas facile interŝanĝi opiniojn.

Ni devos ankaŭ en la venontaj jaroj pli profunde eluzi la eblecon, kiun donas al ni la komuna lingvo, por la ekkono de alies vidmaniero. Universala Esperanto-Asocio estas kultura organizaĵo, do kiam ni traktas la temon, indas turni specialan atenton al la kultura flanko de la demando. La virinoj povas akiri politikan, sed ĉefe ekonomian egalrajtecon, kondiĉe ke ili havu la necesan klerecon. Ĝuste pro tio en la kadro de UNO aparta komisiono okupiĝas pri virinaj aferoj, tiu komisiono aktive kunlaboras kun UNESCO. La frukto de la kunlaboro estas tiu internacia kontrakto, kiun oni akceptis en 1960. Al la kontrakto ĝis nun aliĝis ĉirkaŭ 60 landoj. La subskribintaj ŝtatoj promesis la ĉesigon de diskriminacio, baziĝinta sur raso, sekso, religio, kiu baras egalecon en la kulturo. Apartan ekzamenon meritas la analfabeteco, ĉar multe pli ol la duono de la analfabetoj estas virinoj.

Estimataj Gesinjoroj! Se ni volas iom profane paroli pri la temo, ni povas diri, ke malgraŭ la jura egalrajteco jam ĉe la komenco de la homa historio la virinoj ĉiam havis malrektan potencon en la gvidado de la socio. „Serĉu la virinon!" — certe estas konata eldiro en pluraj landoj. Tamen malgraŭ tio, ke la virinoj ofte havas sian influon malantaŭ la kulisoj, sendube la virinoj postulas por

Jaro de Virinoj*

si mem pli kaj pli da vera decidpovo en la gvidado de la socio, en la lastaj jardekoj ofte ankaŭ sukcese. En tiu ĉi batalo, la virinoj havas grandajn malavantaĝojn. Temas ne nur pri la konservativa pensmaniero de la unuopaj individuoj, sed ankaŭ temas pri eternaj, netransdoneblaj taskoj de la virinoj, kiel ekzemple: la nasko. La familiaj zorgoj ofte malpermesas, ke la virinoj pli profunde okupiĝu pri la problemoj de la tiel nomata ekstera mondo. Tio levas la demandon: ĉu la virino okupiĝu nur pri familiaj aferoj, aŭ aktiviĝu ankaŭ ekster ili. Oni respondas diversmaniere, tamen ŝajnas esti sola solvo la justa disdivido de la transdoneblaj taskoj de virinoj al viroj.

La rolo de Esperanto en la emancipiĝo de la virinoj estas duflanka. Unuavice la Internacia Lingvo liveras al ni taŭgan formon por la interŝanĝo de spertoj, kaj proponoj sur tiu ĉi grava kampo — sen lingvaj kaj naciaj malhelpoj. Due nia propra movado povas montri al la virinoj, ke ĝi scias, kiel trakti ilin egale, kaj kiel antaŭenigi tiun egalecon ankaŭ ekster niaj rondoj. UEA mem ludas aparte gravan rolon sur ambaŭ tiuj kampoj.

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis en la esperanta gazetaro pri tre interesa iniciato de esperantistoj loĝantaj en iu hispana urbo. Ili planas krei premion por tiu edzino, kiu en la lasta jaro plej multe helpis al sia edzo, por ke li laboru en la esperanta movado. Tiu ĉi sincera iniciato rekonas la meritojn de tiuj plurmil edzinoj, kiuj ofertis multegan tempon kaj energion por Esperanto, kvankam ilian nomon ne notas la historio de la Movado. Tamen mi plene esperas, ke venos tempo, kiam la virinoj ludos tian gvidan rolon ankaŭ en la movado, ke pro la samaj meritoj necesos krei premion por la helpemaj edzoj, kaj tiam vere ekzistos egalrajteco de virinoj, almenaŭ en la movado.

* *Forsonis en la Universala Kongreso de Esperanto, en Kopenhago.*

Omaĝo al la virino — Desegno de Károly Reich

Proverboj pri la virinoj

Hejmo sen virino estas kiel muelejo sen akvo.

Viro, kiu ofendas virinon, devas esti punata duoble. (Armenio)

Ne frapu virinon eĉ per floro. (Ĉinio)

La virino estas kunulino de la viro kaj ne lia servistino.

Kiu havas bonkoran edzinon, tiu fortikaĵon povas konkeri.

Elektu edzinon ne dum la ronddanco, sed sur la grenkampo.

Unu patrino nutras dek infanojn, sed dek infanoj ne nutras unu patrinon. (Bulgario)

Edzino sen karaktero kaj hontemo estas kiel pano sen salo.

Bona edzino — dua animo.

Kun bona edzino la malĝojon oni sentas duone, kaj ĝojon duoble. (Sovetunio)

Kiam patrino nutras infanojn, ŝi estas malavara, kiam infanoj manĝigas patrinon, ili nombras ĉiun tagon. (Vietnamio)

Per virina hararo oni povas ligi elefanton.

La boneco de la patro estas alta, kiel montaro, la amo de la patrino estas profunda, kiel la maro.

Patrina pacienco ĉion toleras.

Kolektis KUNĈO VALEV, Sofio

LA TUTA VIVO

Antaŭ la spegulo — Foto de György Kiss

La belega juneco — Foto de György Gonda





La unua tago — Foto de Zsuzsa Sándor

DEZSŐ KOSZTOLÁNYI

VIRINOJ

Ne en flagreto de am' adoleskula
parolas mi.
Meze de l' vivo, florkronita de brakoj virinaj
mi al vi konfesas,
virinoj, miaj parencoj.
Nun mi jam povas diri, ke vi tiel al mi
proksimis,
kiel neniu alia,
kaj mi vin ankaŭ amis ja.

Konfuzaj kiel mi,
fekundaj kiel mi,
malklaraj fontoj, el kiuj oron mi lavis,
oron veran.
Feinoj de l' naturo, kapricaj kaj neelkalkule-
blaj,
sed pli veraj
ol la penso sterila,
ol la mensogul' fiera,
ol la ostoza, timiga, mortigema viro.
Kien ja mi rifuĝus
kun mia hirta kapo,
kun mia poezio,
kun mia terure zigzag-ira ŝanceliĝemo,
se ne ekzistus vi,
komprenaj, pardonemaj
vivantaj sanktulinoj,
piaj paganinoj,
svagaj bonulinoj,
fidelaj mastrumantinoj de l'realo?

Kiam vi kudras aŭ pesas buteron,
rigardas montrofenestron kun faksperto
seriozafekta,
trotetas en galoŝoj gracie, sed ankaŭ mallerte
kiel la albatrosoj,
mi ekridegas de ĝoj', ke vi ekzistas,
kaj ke ankaŭ mi ekzistas apud vi.

Al vi min ligis la destino
por eterne
per umbilika ŝnuro, poste per ŝnuro
vivanta de deziroj,
ke en via profund' mi serĉu la vojon ale al la
vivo,
kaj en vian sinon mi faligu mian kranion
pensgravedan.

Ne unu, sed ĉiu el ili.
Ĉiu 'stas al mi filino, ĉiu 'stas edzino
ĉiu 'stas amikino, amatin' mistera.
Ĉiu 'stas al mi patrino.

Tr. K. KALOCSAY



Meditado — Foto de Zoltán Fejér

La forfluganta tempo — Foto de Eifert



La centa jaro — Foto de Zsuzsa Sándor



Felican novan jaron deziras al ĉiuj legantoj la Redakcio

Ĉe la fino de la dua mondmilito, la Budapeŝta Belarta Muzeo preskaŭ estis prirabita. Kelkaj bildoj estis kaŝitaj diversloke, sed la plej granda parto perdiĝis kaj eble ili ekzistas ie, en nekonata loko. Ekde 1945 la muzeo aĉetis kaj donace ricevis multajn bildojn, ĉefe de hungardevenaj pentristoj ekzemple: Amerigo Tot, Peter Székely, Nicolas Schöffer, Viktor Vasarely kaj aliaj. Multajn heredaĵojn ricevis la muzeo el la kolektoj de privataj personoj. Ĉi-jare oni faris ekspozicion pri la 30-jara kolektado. Multajn difektitajn bildojn la restaŭristoj savis por la postepoko. La tutan ekspozicion ne eblas denombri, tamen ni mencias kelkajn grandvalorajn artaĵojn: La Blua vilaĝo de *Chagall*, La tuko de Veronika de *Kokoschka*, La Fugger de *Lorenzo Lotto*, La Madono de Liberale *da Verona*, Abrahamo kaj Melchizedek de G. van den *Eeckhoudt*, Kompono de *Theo van Doesburg*, grafikoj de *Picasso*, ekzemple la knabinkapo: Rubando en la haroj, grafikoj de *Dürer*, akvareloj de *Signac*, kuprogravuraĵoj pri la teruro de milito de akvafortisto *Callot* kaj multaj aliaj artaĵoj. La riĉa ekspozicio estas inda je la 30-jara datreveno de renaskiĝa muzeo.

Zoltán Fejér: „La verda stelo" — gajninta la unuan premion en Kopenhago

panoramo

Interesa bildaŭkcio okazis en Budapeŝto, kie József Dobroszláv — *arkitekta inĝeniero de entrepreno UVATERV — fama pentristo, ekspozis 107 akvarelojn kaj la tutan enspezon oferis por la helpo de Vjetnamia popolo. La bildoj ĉefe montras la postmilitan rekonstruon de la lando, akvareloj estis videblaj pri la konstruitaj pontoj, fervojlinioj, ŝoseoj, stacidomoj kaj kelkaj portretoj pri tiuj laboristoj, kiuj avangardis en la granda laboro. La enspezo de la aŭkcio estis pli ol 100 mil forintoj.*

* * *

En la urbo Sárospatak en la galerio de la fortikaĵmuzeo Rákóczi, antaŭ nelonge oni malfermis grandsukcesan ekspozicion de la Kossuth-premiita grafikisto *József Domján*. Krom la grafikaĵoj multe da koloraj ksilografaĵoj estis videblaj el tiuj 500 elitaj artaĵoj, kiujn s-ro Domján donacis al la muzeo. La eminenta grafikisto pli ol 20 jarojn vivis kaj kreis eksterlande kaj nun alvenis el Usono por restadi kelkajn monatojn en Sárospatak, kie li havas propran artlaborejon. Inter la 500 donacitaj grafikaĵoj, krom la propraj artaĵoj, tre riĉa estas la kolektaĵo de aliaj grafikistoj, ekzemple: de *Aba-Novák, Derkovits, Kmetty, Adolf Fényes, Szőnyi, Vaszary, Manet, Ĉi Paj Ŝi* kaj aliaj. La urbestro József Tóth, okaze de malfermo de la ekspozicio, transdonis al József Domján la orŝlosilon de la urbo, kiel simbolon de urbcivitaneco. József Domján kun emocio transprenis la ŝlosilon kaj diris: „Dum mi vivos kaj laboros, la eliton de miaj kreaĵoj ĉiujare mi sendos al la urbo Sárospatak!"

* * *

Proksime al Budapeŝto situas la malnova urbo Szentendre, kiun oni ofte nomas „la urbo de artoj". Vere, preskaŭ ĉiu domo estas historia monumento, gardanta la memorojn de pasintaj jarcentoj. En malnova domo antaŭ monato oni molfermis la plej novan muzeon: tiun de Béla Czóbel. *La 92-jara Kossuth-premiita majstro ankoraŭ vivas en bona sano kaj kreas unu post la alia la kolorpompajn pentraĵojn. Lin atingis tiu feliĉo, ke dum lia vivo estiĝis muzeo por lia verkaro kaj en la korto de la muzeo staras la skulptaĵo de la fama pentristo. La ekspozicio estas konstanta, sed nur unu parto estas videbla samtempe el la tuta verkaro pro la manko de sufiĉa loko; ĉirkaŭ 80 nombras la pentraĵoj.*

* * *

La Hungara Nacia Muzeo ĉijare aranĝis ekspozicion en Svedio, en *Stokholmo*, poste en *Göteborgo* pri la arkeologiaj trovaĵoj de la popolmigrado. La hungarajsvedaj arkeologiaj interrilatoj jam estas pli ol centjaraj. En 1874 la direktoro de la Hungara Nacia Muzeo *Flóris Rómer* partoprenis en Stokholmo en la 7-a Internacia Kongreso de arkeologoj kaj antropologoj, kaj tie laŭ la komisio de la hungara ministraro li invitis la partoprenintojn al Budapeŝto, viziti la 8-an Internacian Kongreson. En 1876 okazis tiu kongreso, kiun partoprenis 39 scienculoj nur el Svedio, inter ili tiaj nomoj, kiel *Oscar Montelius, Hans Hildebrand, J. H. Kramer, Sven Nilson, Hjalmar Stolpe*. Post la kongreso la svedaj arkeologoj studis en Hungario, la hungara arkeologo *József Hampel* studis en Svedio la ko-

panoramo

munajn bronzepokajn malkovraĵojn. Pri la epoko de la popolmigrado, la unua komuna esploro okazis en 1890, kiam la sveda *Bernhard Salin* kaj poste en 1920 *Nils Aberg* en Hungario kaj en 1932 *Nándor Fettich* en Svedio faris esploron kaj ili ĉiuj verkis libron pri la komunaj rezultoj. Post 1945 la svedaj profesoroj *Holger Arbman* kaj *Wilhelm Holmquist*, kun multaj junaj scienculoj, venis al Hungario, kaj tiam naskiĝis la penso aranĝi ekspozicion en Svedio. La nunan ekspozicion aranĝis *Birgit Arrhemis* kaj la direktoro de Statens Historiska Museum d-ro *Olov Isakson* en Stokholmo, kie la hungara profesoro *István Bona* faris prelegon. En la kadro de hungara-sveda kunlaboro la Statens Historiska Museum en la proksima estonteco sendos materion pri la vikinga epoko por aranĝo de ekspozicio en Budapeŝto.

* * *

Ekde jardekoj vivas en Parizo la hungara fortepianisto György Cziffra, kiu, kun la helpo de franca ŝtato, faris fondumon por la junaj talentaj muzikartistoj. La Fondation Franz Liszt — Fondumo Ferenc Liszt — situas proksime al Parizo en malgranda urbo Senlis. Sed la vojo ĝis tiu fondumo estis sufiĉe longa. La unua paŝo okazis en la vilaĝo Chaise-Dieu, kie en admirinda valo staris antikva kapelo sen benkoj, sen tegmento. La franca kultura ministerio donis financan helpon kaj la plurcentjaran konstruaĵon oni tute rekonstruis, pretigante koncertejon por 2000 personoj. Poste sekvis Versailles, kie Cziffra aranĝis muzikfestivalojn kun nekonataj muzikistoj. En Chaise-Dieu oni okupiĝis pri ĉiu muzikilo, sed en Versailles nur pri fortepiano. Al la koncertoj tumultis la publiko, plimultiĝis la mono; el tiu sumo aĉetis György Cziffra la miljaran preĝejon kun trietaĝa domo en la urbeto Senlis. Ambaŭ konstruaĵoj estis ruinoj. Laŭ la malnovaj dokumentoj, la reĝan kapelon la edzino de Hugo Capet, la reĝino Adelaide konstruigis en 990, honore al Sankta Frambourg. En la disfalinta kelo oni trovis netakseble valorajn artotrezorojn, skulptaĵojn, pentraĵojn. La franca registaro surprenis la duonon de la tuta elspezo kaj donis ordenon al Cziffra. Nun jam bone evoluas la konstruado, en la partero estos la seĝovicoj kaj la podio, en la kelo estos muzeo, en la galerio estos ekspoziciejo kaj baletlernejo, en la kontraŭa domego estos la lernoĉambroj kaj la loĝejoj por la junaj talentoj de kie ajn el la tuta mondo. La Aŭditorio Franz Liszt agados en la spirito de Debussy, Ravel, Bartók, kaj César Frank. La Fondation Franz Liszt estos la hejmo de ĉiu arto kaj ni estas fieraj pri tio, ke estigis ĝin la volo de hungardevena viro.

* * *

En la monato Septembro okazis en Budapeŝto la 5-a Internacia Turka Arta Kongreso. Alvenis el 16 landoj la esploristoj, kiuj en preskaŭ 100 prelegoj konigis plej novajn rezultojn de la universala islama kaj turka arkeologio, arkitekturo, belarto, kaliografio, artindustrio kaj numismatiko. Samtempe oni malfermis en la Hungara Nacia Muzeo ekspozicion pri la arkeologiaj memoraĵoj de tiuj turkoj, kiuj vivis iam en Hungario.

Szilárd BÁLINT

Feliĉo — Foto: Z. Fejér

Antaŭ 15 jaroj Hungario, Finnlando kaj Sovetunio laŭvice, ripetiĝante entreprenis la aranĝadon de la finno-ugraj kongresoj. Kun multenombra patrolanda kaj preskaŭ mil eksterlandaj partoprenantoj venontaj el 24 landoj refoje en Budapeŝto kunsidis internacia finno-ugra kongreso, la 4-a: inter 9. 9. 1975 — 15. 9. 1975, sub aŭspicio de UNESKO, sub la ĉefprotektorato de Pál Losonczi, prezidia prezidanto de Hungara Popolrespubliko.

Dum la pasintaj jardekoj elkreskis la interesiĝo pri la demandaro de finno-ugraj sciencbranĉoj kompleksaj, la esploroj iĝis pli sistemaj dum la plua florado, ĉion ĉi oni povas danki ĉefe al la pli favora turniĝo de la internacia politika medio. Plifortiĝas la internacia kunagado scienca.

En la literatura, lingvistika kaj etnologia sekcioj oni raportis pri siaj atingitaj rezultoj.

Finfine la kongreso kun granda plaĉo decidis, ke oni aranĝos internacian simpozion pri la fonologia sistemo de la uraldevenaj lingvoj en 1978 en Budapeŝto, oni aranĝos ankaŭ en Hungario en 1977 trisemajnan uralistikan kurson, kaj la kongreso iniciatis fondi *internacian hungaran filologian asocion*, kiu interligos la scienculojn, esploristojn de diversaj landoj okupiĝante pri la hungaraj lingvo, literaturo kaj etnologio. — Oni aranĝos la 5-an internacian finno-ugran kongreson en la Finnlanda Turku en 1980. — SZMR

D-ro Ferenc László

La ŝirmado de la pureco de akvoj en Hungario

En la lasta tempo tutmonde kreskis la interesiĝo pri la problemoj de mediośirmado. Ties klarigo estas, ke la impeta evoluo de la tekniko kaj la pliiĝo de urbanizado kaŭzis pli kaj pli multe da mediaj nocadoj.

Tiuj simptomoj instigas la homaron konscie, laŭplane elimini kaj anticipi la nocojn.

En Hungario la mediośirmado havas signifajn tradiciojn. La hungaraj inĝenieroj (unuavice la hidrologoj kaj forstinĝenieroj) pro la efikoj rezultintaj el la procezoj dum la turka okupado (1541—1689. Red.) ĉiam pli kaj pli rezulte kontraŭagis la sekvojn de la grundo-korodiĝo, erozio: la forstinĝenieroj sur la tereno de rearbarizo, — la kulturinĝenieroj por malhelpi la erozion kaj por la arboreplantado sur kalvejoj, — la agrarinĝenieroj, la grundbiologoj por remparumadoj kaj por renovigo de la grunda vivo. Iliaj iniciatoj — el inter kiuj pluraj iĝis konataj ankaŭ trans niaj landlimoj — estas rigardeblaj internaciaj pioniraĵoj de klopodoj sur terenoj de medioprotektado.

Kvankam la certigo de akvokvalito estas relative nova problemaro en la internacia vivo, la hungara jura reguligo povas rerigardi al pr. 130-jara paseo sur tereno de ŝirmado de la pureco de akvo.

La leĝartikolo X. el 1840. pri la akvoj kaj kanaloj minacas per monpuno tiujn, kiuj poluis[1] (malpurigis) la akvojn kaj kanalojn per balaaĵo, tero, sterko, aŭ per ruado[2] de kanabo.

La leĝartikolo pri la publika sanitaro (N-ro XIV. el j. 1876) jam rajtigis la publikan aŭtoritaton, ke ĝi povas forigi, eĉ uzante devigon, — ĉion, kio faras malpuraj la grundon aŭ akvojn. Tiu leĝa normo preskribis memstara aŭtoritata tasko la observadon de tio, ĉu la tiam evoluiĝontaj industriejoj efikos noce je la sanio.

La unua fazo de manipulado per kloakakvo

Unu jardekon poste la leĝartikolo (n-ro XXIII. en j. 1885) parolanta pri la akvojuro, malpermesas la infektadon de akvoj per nocaj materialoj, tamen atentante la akvouzantojn kaj la interesojn de la industrio, komisias la aŭtoritaton decidi pri tio, ĉu la poluitaj akvoj estas enkondukeblaj en la vivajn akvojn. Se la poluaĵakvoj kaŭzis al neniu damaĝon, tiam oni eĉ purigi ne estis devigita ĉar „kontraŭa procedo farus tre multekosta, aŭ eĉ neebla la praktikadon de industrio" — tiel tekstas la motivado.

Post la liberiĝo la akceleriĝinta industria evoluo pliigis la malpuriĝon de la akvoj, kaj tio jam urĝas solvi la problemon de la efika ŝirmado de akvokvalito.

La registaro en ĝusta tempo rekonis la esencon de la problemo kaj la sferon de la farendaĵoj. Al tio oni povas danki, ke nia leĝkreado akiris jam takseblan rezulton en la eldono de la juraj disponoj rilate la protekton de la homa medio. Tiuj jurnormoj ebligas altnivelan laboron sur teritorioj de ŝirmado de akvokvalito, en la defendo kontraŭ aer-kaj akvomalpuriĝo, konservado de la naturaj valoroj, ktp. Komenciĝis planado de mediośirmaj taskoj en kadro de la longtempaj popolekonomiaj konceptadoj, kaj iĝis pli efika la scienca esploro kunligita kun la mediośirmado.

Rilate la mediośirmadajn taskojn la aŭtentaj organoj reprezentas tiun ĝustan starpunkton, ke en la ŝirmado kaj protekto de la homa medio la primara celo ne estas nur la laŭvorta ŝirmado, sed la anticipa, laŭplana medioformado. La necesaj kondiĉoj estas formeblaj unuavice per la investada politiko, elekto de la konformaj teknologioj kun ĝustaj ekonomiaj reguliloj, per bone konsideriata koloniad-evoluigo.

Ĉi-okaze ni ne havas eblecon intensive okupiĝi pri ĉiu demando de la mediośirmado, — ni trarigardas nun sole unu el ĝiaj gravaj terenoj, nome la akvomastrumadon.

Aliformiĝon de la akvopoluado en Hungario ni povus prezenti per kelkaj indikoj. Dum en 1950 el la loĝteritorioj kaj el industriaj uzinoj fluis jare po 312 milionoj da m^3 da kloakakvoj en niajn vivajn akvojn, post dek jaroj, en 1960 jam 520 milionoj da m^3, en 1970 preskaŭ 1 miliardo da m^3. Hodiaŭ tiu nombro atingas 1,2 miliardojn. Do dum en intervalo 1950—1960 la dekjara kvanto de kloakakvoj kreskis proksimume per 50%-oj, la kresko inter 1960 kaj 1970 estis 100 procenta.



Bazeno en Agárd, por sedimentigo de kloakakvo

Al la kompleteco de tiu aspekto apartenas ankaŭ la manipulo de kloakakvoj antaŭ ol lasi ilin flui en la akvojn. En j. 1950 sur la loĝteritorioj ni entute ne povis jam paroli pri purigo de kloakakvo; de tiaj akvoj, venantaj el la industriejoj estis purigitaj nur la 10%-oj. Hodiaŭ estas iom pli bona la situacio. Ĉe la publikaj kanaliz-uzinoj estas purigataj 36% de la konstante kreskantaj kloakakvoj, en la industrio oni manipulas 67%-ojn tute aŭ parte. La ciferoj — eĉ se ili malkaŝas ankaŭ la postreston de la pretendoj — montras parte ankaŭ la intertempe kreskintan akvokvanton de kloako, tamen samtempe respegules ankaŭ grandajn klopodojn, fortostreĉojn. Tiujn lastajn ni trovas respektindaj, se ni priatentas, ke la kanalizado kaj kloakakvo-purigado postulas tre altan konstru-elspezon. La investada kosto de kapacito por plenumi tage po 1 m^3 da purigita kloakakvo, atingas 20—25 000 forintojn.

Tiuj rezultoj ŝajnantaj modestaj postulis dum unu kaj duono da jardekoj 16 miliardojn da Ft-oj por investadoj kanalizaj kaj kloakakvo-purigadaj en la loĝteritorioj kaj en industrio.

Kia estas la situacio en Hungario nuntempe rilate la poluadon de fluakvoj? Se determini la kvaliton de akvoj laŭ la organikaj poluantaj materioj, granda parto de la rivero *Tisza* (Tibisko, la dua plej granda rivero de Hungario) kaj la fluakvoj de ĝia akvokolekta teritorio apartenas al la I. kvalitokategorio laŭ la unueca klasifiko akceptita de la landoj de Konsilio de Komuna Ekonomia Helpo. Aliflanke Danubo apartenas al la klaso II., inter la akvogrupoj de tolerebla malpuriĝo. Inter la fluakvoj pli malgrandaj bedaŭrinde ankoraŭ multaj estas tre malpuraj. Tiaj estas ekzemple la riveretoj *Sajó*, *Tarján*, la kanaloj *Nádor-csatorna* kaj *Pécsi-víz*. Ĉe tiuj eĉ en la lastaj jaroj ne okazis pliboniĝo, kontraŭe la Danubo-brako de *Rákkeve* (ĉe Budapeŝto) malbonfama pro la ripetiĝintaj fiŝ-ekstermiĝoj, kaj la antaŭe poluita lago *Tatai*-tó nun jam estas taŭgaj por refresigo, sportado. Komencaj signoj de la pliboniĝo ĉi tie jam estas evidentaj.

La modestajn rezultojn antaŭis tre serioza laboro. Je tio ne sole la akvoprizorgaj institucioj dediĉis grandan energion, sed ankaŭ la uzinoj kaj organoj de konsilioj akcelerigis la laboron por malpliigi la menciitajn grandajn mediajn nocojn — precipe en la lastaj jaroj.

La akvoaferaj organoj kreis efikan sistemon teknikan, juran, administran kaj organizan laborantajn en la intereso de la ŝirmado de akvokvalito, eble plej frue inter ĉiuj brancoj. Inter aliaj estiĝis laboratoria reto de la 12 akvoaferaj direkcioj kaj ilia inspektora organizaĵo, krome la centra akvokvalita inspektorio. Ties komuna laboro kontrolas sisteme la staton de la akvoj en tridek lokoj. Antaŭ nelonge finiĝis la instalado de kelkaj aŭtomataj stacioj mezurantaj la akvokvaliton, tiel ekzemple ĉe *Rajka* kaj *Sajópüspöki* (unua ĉe la okcidenta, dua ĉe nordorienta limo. Noto de Red.), kiuj estas la unuaj modernaj paŝoj de la futura kontrolo de akvokvalito. La akvoaferaj aŭtoritatoj, la akvokvalitaj inspektorioj, la distriktaj komitatoj por ŝirmado de akvokvalito, la sanitaraj organoj konsistigas jam hodiaŭ bone harmoniantan organiza-



Moderna kloakakvopuriga konstruaĵo

ĵon, kiu klopodas plej efike efektivigi la celojn, kiujn enhavas la regionaj programoj akvokvaliton ŝirmantaj, kunlaborante kun la uzinoj kaj konsilioj per kontaktoj ekzistantaj kaj konstante plibonigantaj.

La monpuno kaj ĝia efiko

Krom la menciitaj juraj kaj teknikaj reguloj estas tre efika — se eĉ ne la plej populara rimedo — la ekonomia devigo, la monpuno al la akvomalpurigantoj. La monpuno pro malpurigo kreskis de la 1962-jara 6 milionoj grade ĝis 1971, kiam ĝi atingis la sumon de 180 milionoj. Ekde tiam la suma monpuno restas proksimume sur tiu nivelo. Espereblas, ke tiu konstantiĝo signifas la samtempan malpliiĝon de la malpuriĝoj. La punpagoj alvenantaj al la Akvoafera Fondaĵo servas ekskluzive la celojn de la akvoŝirmado, enkalkulante ankaŭ la apogon donitan al tiucelaj investadoj de la uzinoj, institucioj. La esploroj montras, ke la industriaj entreprenoj — kaj inter tiuj precipe la kemia industrio — elspezas vere grandajn sumojn por la akvopurigo. Ĝojindaj estas la fortostreĉoj direktataj parte de la konsilioj por la kanalizado de urboj kaj por purigo de poluoakvoj.

Ĝenerale oni spertas, ke la reguliga sistemo prilaborita por la protektado de akvoj montriĝis taŭga dum la pasintaj 15 jaroj, ĉe novaj industriaj instalaĵoj oni solvas la akvopurigadon jam dum la planellaborado. Malfacilaĵoj estas sperteblaj ĉefe ĉe la rekonstruado de malnovaj uzinoj kaj ĉe la plibonigo de la malmoderniĝinta akvopuriga sistemo de urboj, komunumoj. Nedubeble estas tamen, ke sur ĉi tiu teritorio pozitive ŝanĝiĝas la respondeca konscio kaj aspekto. La uzinoj nun jam ne rigardas la purigadon de kloak-akvo kiel superfluan malbonon, sed kiel parton de fabrikteknologio, kiu helpas konservi la vivajn akvojn puraj, per tio kontentigante la konstante grandiĝantan akvobezonon de futuro. La purigo kaj lokado de kloakakvoj, — la pliiĝanta malpuriĝo kaj la antaŭe ne koneblaj novaj specoj de kloakoj — kaŭzas grandiĝantan zorgon, multajn novajn taskojn, kaj bezonas ankaŭ novajn teknikaĵojn. Ĉe ni ĉefe la kemia industrio pro sia konstanta evoluo pliigas la problemojn kaj kostojn de la purigado de kloakakvoj. La konstruo de specialigitaj bestedukaj establejoj necesigis solvon de novaj problemoj mediosirmaj kaj de novaj lokoj, kien oni metu la kloakon.

La akvopolua efiko de la sterkaĵo venanta el la specialigitaj bestedukaj establejoj nun egalas la akvomalpurigon de 6 milionoj da loĝantoj. La problemo de organizado, reguligo, elekto de efika komponento estas la plej moderna protektado kontraŭ la akvomalpuriga efiko de la daŭre disvastiĝanta pesticido.[3]

La estableja reto rapide evoluas, la industrio postulas ĉiam pli multe da akvo. Sekve de tio la kvanto de la du specoj de poluakvoj en 1985 estos duoblo de la nuna unujara, 1,2 miliardoj m^3. Pli antaŭvide ni devas pretiĝi por protektado de la akvoj kaj akvaj medioj uzante la ĝisnunajn spertojn, sed per novaj, eĉ pli modernaj metodoj.

UNO-Modelteritorioj por protekto de akvokvalito

La akvoaferaj organoj en 1971 prilaboris por du modelteritorioj la programon de reguligo de la akvokvalito-protektado, kiu servas la celon, ke akordigite oni povu en kompleksa maniero forigi la pliiĝantan malpuriĝon laŭ la spertoj akirotaj per konstruenda modelsistemo akvokvaliton ŝirmanta. Por tiu laboro antaŭplanis la akvomastrumadaj organoj 110 milionojn da forintoj. Laŭ la interkonsento kontraktita inter la hungara registaro kaj la Evoluiga Fondo de UNO, la mondorganizaĵo donas preskaŭ unu milionon da dolaroj por tiu grandsignifa laboro inter 1972—76.

Oni elektis la modelteritoriojn sur la supera etapo de Danubo en ĝia Hungaria fluo, krome en la valo de rivereto *Sajó* (fluanta en riveron *Tisza).* La laboroj komencitaj antaŭ du kaj duono da jaroj ha-

vas taskon formi kompleksan sistemon de ŝirmado de akvokvalito. Unuavica tasko estas kolektado de indikoj necesaj por la planado kaj ties prilaborado per kalkulmaŝino. Granda zorgo de nia epoko, la forigo de mikromalpurigaĵoj, estas unu el la celoj de la esploroj. Krome grava tasko de tiu signifa programo estas la ekzameno de la ŝarĝebleco de la koncernaj akvofluoj, krome de la novaj modernaj purigteknologioj kaj ne lastvice la pritaksado de la efikeco de la ekonomiaj kaj juraj reguliloj.

UNO disponigas por tiuj laboroj per la Sanitara Mondorganizaĵo specialajn instrumentojn en valoro de 300 000 dolaroj. Ĝis nun proksimume 21 konataj eksterlandaj ekspertoj (en la praktikado de poluakvo-purigado kaj en ŝirmado de akvokvalito) kunlaboris en la efektivigo de la programo. Krome preskaŭ 80 hungaraj ~~eksperto~~j havis eblecon akiri eksterlandajn spertojn en kadro de tiu programo.

La akvokvaliton ŝirmanta modelo prezentas optimumon teknikan kaj ekonomiecan ne sole por la elektitaj regionoj apud *Sajó* kaj *Danubo*, — sed ĝia ĉefa celo estas la utiligo de la tieaj rezultoj ankaŭ sur aliaj regionoj de la lando. Cetere la Sanitara Mondorganizaĵo uzos ankaŭ en aliaj landoj la praktikajn rezultojn de la kvinjara esplora kaj eksperimenta laboro okazanta en nia patrio.

Internacia kunlaboro

En la kadro de la internacia akvoŝirma kunlaboro estiĝis niaj interkonsentoj duflankaj kun la najbaraj landoj. Malgraŭ malfacilaĵoj ankoraŭ ekzistantaj, montriĝis en la lastaj jaroj multaj bonaj rezultoj (limakvo-ekzamenoj, antaŭ-avizo de neatenditaj malpuriĝoj). Laŭ vidpunkto de Hungario estas speciale gravaj tiuj atingaĵoj, kiujn la socialismaj landoj akiris en la akvomastrumada kunlaboro en kadro de la Konsilio de Komuna Ekonomia Helpo: la teknikaj bazaj principoj kaj metodoj de la kunlaboro ĉe la komunaj akvokolektujoj; bazaj principoj de la kvalita klasigo de akvoj; unuecigitaj metodoj kaj iloj servantaj la akvokvaliton; modernigo de la akvopurigaj teknologioj; agado por unuecigo de la akvopurigaj maŝinaj instalaĵoj kaj por specialigo de ilia fabrikado, ktp.

* * *

Eble evidentiĝas jam el la ĝisnunaj indikoj, ke la ŝirmadon de akvoj kontraŭ malpuriĝoj prezentas ne sole la purigado de kloakakvoj, sed ĉe ĉiu akvokolektejo longa ĉeno de disponoj. Ĉio komenciĝas ĉe la uzinoj per la logika uzina akvomastrumado, elpreno de defalaĵoj el la kloakakvo, loka akvomanipulado, kaj finiĝas per konstruo de instalejoj por purigo de poluakvoj, kaj sennoca rekonduko de la purigitaj akvoj en la naturan medion. Kune kun ĉi tiuj disponcj — kie la eblecoj por tio troviĝas — oni devas konsideri la konstruadon de kolektejaro kompletige pliiganta la akvojn, aŭ de rezervujoj por periodaj kloakakvoj.

Laboratorio por esploro de akvokvalito

Tiuj bone helpas la surgrundajn naturajn akvofluejojn, ke ili povu akcepti la purigitajn kaj ellasitajn kloakakvojn sen nocoj, aŭ kun la plej malgrandaj damaĝaj sekvoj — en tia tempopunkto, kiam plej granda estas la ŝarĝporta kapablo de la akceptantaj akvujoj.

La protekta agado dum 15 jaroj tre vastiĝis, ĝia efikeco kreskis, tamen tio ne vidiĝas jam kompleta. La laboron de la ŝirmado oni devas konstante perfektigi inter la kadroj de organizado en sferoj kaj teknikaj (iloj, metodoj) kaj juraj, kaj en la administraj ĉefaj agadsferoj. Samtempe oni devas adaptiĝi al la konstante ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj de la akvomalpuriĝoj.

Oni devas plani la operativajn ŝirmajn intervenojn. La ŝirmaj verkaĵoj estigitaj laŭ spontanaj imagoj ofte ne estas la plej urĝaj, nek le plej gravaj, kaj nur malmulte helpis la efektivigon de la bazaj celoj. Tio kondukis al la diseriĝo de laborfontoj.

Multe pli praviĝis efikaj la intervenoj, por forigo de kloakakvoj, baziĝantaj sur planoj ellaboritaj

Lukto kontraŭ la mazuto-malpuraĵo apud Dunaújváros

Vigla velŝipa vivo en la renovigita lago Velencei

por apartaj regionoj. Per koncentrigo de la fortoj estas ĉesigeblaj la plej gravaj poluad-fontoj.

Tiun celon servas la regionaj planoj de la akvokvalita ŝirmado. Mezurante la situacion de malpuriĝo sur apartaj akvokolektejoj, la eblojn de evoluo, — oni povas krei la operativan planon de la necesaj intervenoj, konstati la takton de efektivigo. Tiaj planoj pretiĝis por la akvokolektejoj de

Öreg-tó (Olda lago) en *Tata,*
kanalo *Séd-Nádor,*
Pécsi-víz, Fekete-víz (akvofluejo ĉe urbo Pécs; Nigra akvofluejo)
Zagyva,
Ráckevei Dunaág (Danubo-brako ĉe Ráckeve),
Velencei-tó (Lago de Velence)

Estas jam prilaborata la operativa plano de la akvokvaliton ŝirmanta instalaĵo en lago-regiono de Balatono.

La lago Balatono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas la plej ŝatata somerumejo de nia lando. La harmonion de kontaktiĝo de lago kaj pejzaĝo, ĝian belecon de lirika inspiro, konceptis niaj poetoj tre ofte. Ke ĉio ĉi tio restu vera, la ekspertoj de la lago devas okupiĝi pri la strukturo de kontakto inter lago kaj pejzaĝo, eĉ surbaze de sekaj, objektivaj observoj, ekzamenoj.

La lagosurfaco estas rondcifere 600 km^2, longo de ĝia bordo preskaŭ 200 km (longo de la surborda regiono, servanta senpere la ripozadon, estas 130 km-a). La akvokolekta teritorio estas 5774 km^2-a. La akvofluoj nutrantaj Balatonon nombras 125, inter tiuj plej grava estas rivero *Zala.*

La ripozejan strion ĉirkaŭ la lago difinas la Balatona Regiona Plano, kiu harmonie kun tio aranĝis la grandec-ordon, rolsferon de la loĝterenoj. Ĝi skizis la ĉefajn direktojn de evoluigo de regionoj. En tiu ĉi areo inter ekonomiaj faktoroj de la evoluo, havas gravan lokon la enlanda kaj internacia

fremdultrafiko. La fremdultrafikon karakterizantaj ciferoj en Balaton-regiono montras, ke en la lastaj jaroj tre grandiĝis la utiligo de la lago. La ripozregiono povas sian funkciadon laŭ la oportuneco plenumi nur en tiu kazo, se oni povas ĝui la belecojn de la pejzaĝo, la akvo, la ĉirkaŭaĵo kaj naturo en ordigita, kulturita medio sen plenŝtopiteco per homoj. La okazebla troa utiligo de la lago estas unu el la atakoj kontraŭ kvalito de la lagakvo. Multe pli oni devas pretiĝi por akcepto de la gastoj somerumantaj kaj por organizita forigo de la mediaj nocoj devenantaj el tiu gast-amaso, — ol por administra limigo de la nombro de vizitantoj.

Ee Balatono — kiel lago — pli markantan efikon produktas la ekonomia aktiveco funkcianta sur la akvokolektejo. Ni devas percepti, ke la produktaj grupoj de la regiono grave kontribuas al la landaj enspezoj, kiujn malgrandigi ne eblas kaj ne necesas. La fremdultrafiko estas nur parta enspezfonto. La konstanta loĝantaro vivanta sur tiu ĉi teritorio devas ĉi tie labori, lukri, kaj tio estas ĝuste tiel grava, necesa postulaĵo, kiel sur aliaj teritorioj de la lando.

Centmiloj da homoj ĝuas ĉiusomere la molan, varman akvon de Balatono





La akvujo en Lázbérc garantias la akvoprovizadon de la industriregiono en Borsod

Baza postulaĵo povas esti tamen en la akvokolektejo de Balatono la teritoria evoluigo de la produktaj objektoj, evoluigo de la maniero de produktado en tia direkto, kiu malpleje ĝenas la vivon de la lago, ĝian ĉirkaŭaĵon.

Inter la teritoria evoluigo, la utiligo de Balatono kaj la akvokvalito de la lago estas sendube kontraŭdiro. La bazan destinon de la lago difinas la akvokvalito. Se tio malboniĝas, ĝuste la bazaj funkcioj ne estas plenumeblaj. La plej grava tasko estas la solvo de tiu kontraŭdiro, respektive almenaŭ proksimiĝo al tio per validigo de ekologiaj kaj ekonomiaj vidpunktoj.

Celo de la medioširmado de la Balaton-regiono estas la gardado de la salubra laga karaktero, širmado kontraŭ nocaj efikoj artaj kaj naturaj por konservi la ripozregionon. Tiu montrita celo estas atingebla per ellaborado de optime sintetiza evolua koncepto atentanta la utiligon kaj šarĝeblecon. En tiu direkto jam antaŭ kelkaj jaroj okazis la ekfunkciigo de la necesaj disponoj.

Tr. A. *Pechan*

Glosoj. 1) polui: *malpurigi medion de vivo (Vd. HV. 1974/19, paĝo 19. — HV. 1975/4. p. 18.). 2)* rui: *maceri tekseblan planton en likvaĵo (Vd. PIV, Pe E—H vortaro). 3)* pesticido: *substanco kaŭzanta peston al vivantaj estaĵoj. 4)* noci: *malutili.*



Kodály-Instituto en Hungario

Pri Zoltán Kodály oni tutmonde scias, ke li estis granda, vera klasika komponisto hungara, kaj ke per lia agado li multe aldonis al la gloro de sia patrolando.

Sed relative malpli multope oni scias, ke Zoltán Kodály estis ne nur komponisto: li estis muzikpedagogia geniulo. Tion pruvas, ke en multaj partoj de la mondo fondiĝis kaj fondiĝas institutoj por ĉerpi el liaj muzikpedagogiaj principoj.

Ne mirinde, ke en Hungario ĝuste en lia naskiĝurbo, *Kecskemét* fondiĝis instituto pro progresigi la muzikinstruadon laŭ liaj teorioj.

Kio estas la celoj de la Instituto Kodály en Kecskemét? Ĝenerale: konatigi, propagandi la muzikinstruajn pricipojn de la granda hungara majstro kaj evoluigi ilin enlande kaj eksterlande.

Krom tio la Instituto faras muziksciencan laboron: ĝi esploras la teoriajn fundamentojn de la lerneja muzikinstruado, la interrilaton de la muziko kun aliaj artobranĉoj ktp. Samtempe ĝi entreprenas aranĝi kursojn por eksterlandaj muzikinstruistoj. La kunlaborantoj de la Instituto verkas modernajn lernolibrojn por lernejaj lernantoj kaj gvidilojn por muzikinstruistoj.

Interesa aranĝaĵo de la Instituto estas unujara kurso sole por eksterlandanoj pri solfeĝo, kantoinstruo kaj ĥor-gvidado.

Fundamenta tasko de la Instituto estas la kolektado de dokumentoj rilate al *Kodály kaj la muzikpedagogio.* Ĉi tiu agado kondukos al la fondo de speciala Kodály-arĥivo.

La fondo de la Instituto en Kecskemét okazis en la jaro 1973. Sed jam antaŭe multaj muziksciencistoj kaj aliaj fakuloj laboris en la direkto de la agado de l'Instituto. La fondon preskribis ministra ordono, pruvante, ke la registaro de Hungario taksas grava la estigon de tiu muzikscienca instituto.

Nuntempe la kadroj de la Instituto fariĝis sufiĉe larĝaj. Ĝi havas 20 kunlaborantojn.

Nature estas, ke la Instituto influis la tutan muzikinstruadan manieron ne nur en Hungario, sed en la tuta mondo. Kaj ne nur la muzikinstruadon; aliaj branĉoj de la muzikkulturo fortiĝis per la influo de la Instituto.

Parolante pri Kodály-Instituto multaj mencias la t.n. Kodály-metodon. Ĉi tiu esprimo estas falsa. Kiel ni jam menciis, Kodály estis muzikpedagogia geniulo; sed memstaran metodon de la muzikinstruado li ne ellaboris; ĉi tio estis kaj estas tasko de liaj disĉiploj. La principojn de la muzikpedagogio ĉe Kodály ni do devas nomi *teorio.*

Certe estas interese klarigi per kelkaj vortoj la principajn detalojn de ĉi tiu teorio.

Ni povas resumi ĝin en 4 punktoj: 1. Evoluigo de la interna aŭdokapablo. 2. Instruo de la muzika skribado kaj legado. 3. La realigo de ĉi tiuj celoj sur bazo de la popolmuziko (kio ja estas la natura gepatra muzika lingvo de ĉiu). 4. Ĉion ĉi tion instrui per la relativa solmizacio (solfeĝo).

Estas certe necese klarigi mallonge la sencon de la esprimo solmizacio. La fundamenta principo de ĉiu tiu melodiinstrua metodo estas la preciza trovado kaj kantado de la duontonoj en la gamoj kaj melodioj. La sistemo de la duontonoj kaj totalaj tonoj karakterizas la gamojn. La alternado de ili determinas la gamojn, ĉe ekiro ekde iu ajn sono. Se ni do scias kie troviĝas la duontonoj, ni jam povas difini la respektivan gamon. *Relativa* estas la solmizacio, se ne estas difinita antaŭe la elira tono. La principojn de la relativa solmizacio Kodály ellaboris en la 30-aj jaroj, la aliajn menciitajn principojn en la 10-aj jaroj de nia jarcento.

Komence ni jam menciis, ke en diversaj partoj de la mondo troviĝas t.n. Kodály-Institutoj. La plej konataj estas en *Bostono* (Usono) *Tokio* (Japanio), *Ottawa* (Kanado) kaj *Sidney* (Aŭstralio). Estas menciinde, ke en *Tokio* oni ellaboris, laŭ la principoj de Kodály, muzikinstruan metodon sur bazo de la *japana* popolmuziko. La Kodály-Institutoj okupas sin cetere pri kulturado de muzikinstruistoj sur universitata nivelo. En kelkaj universitatoj la Kodály-teorio estas instruata en aparta katedro, ekz. en *Oakland* kaj *Illinois* (Usono). Apartan Kodály-Asocion oni fondis en *Freiberg* (FRG).

Kodály per sia muzikpedagogia agado daŭrigis la tradicion de la grandaj majstroj de la muzikkulturo. Joh. Seb. Bach verkis du- kaj trivoĉajn inven-

(La Kodály-Instituton oni inaŭguris la 29-an de septembro. — Redaktoro.)



ciojn kun pedagogia celo; ankaŭ Rob. Schumann verkis multajn altnivelajn muzikpecojn por komencantaj pianistoj. Béla Bartók mem verkis grandiozan kaj grandsignifan muzikpedagogian verkon kun la titolo Mikrokosmos.

Kodály komponis kun pedagogia celo plejparte ĥorverkojn por infanoj. Certe, ke sur la tereno de la pedagogio li kreis eterne vivantajn verkojn. La Kodály-Institutoj zorgas pri tio, ke la iniciato de Kodály fariĝu progresa tradicio.

Lajos LESZNAI

Kodály-metodo en Peruo

La muzika metodo Kodály disvastiĝas en la tuta mondo. En Peruo la muzikprofesoro László Ördög kun la edzino kaj la filino Marika — ankaŭ profesorinoj — instruas la metodon Kodály. Unue en 1970 nur László Ördög ricevis inviton al Peruo. La profesoro, kiu bone konas la hispanan lingvon, instruas en du universitatoj: en Santiago kaj en Bolivio. En Limao, en la universitato San Markos, li instruis 130 kantprofesorojn. Pro la granda sukceso en 1974, en la kadro de kultura konvencio, la registaro en Lima petis, ke ne unu, sed tri profesoroj konigu la hungaran metodon Kodály. Tiamaniere la tuta familio transloĝiĝis al Peruo, kaj tie komencis la grandan laboron per kolekto de popolkantoj, kun ties helpo ili instruas en hispana lingvo. Estas interese, ke Marika Ördög instruis ĥoron, kiu en klara hungara lingvo kantis la popolbaladon: „Venu kun mi, Anna Molnár."

GYULA ILLYÉS

DANKE

Pereus la homar' sen ido,
se la virinoj aŭdus, kian
fi-tonon uzas viroj, kiam
ili obscenas kun hen-rido
pri la minut', kiu dediĉas,
kiel oaza fonto sorbon,
la genufleks-kultatan korpon,
kiu kraĉujo poste iĝas.
Kiom ni, kun fidelo vera,
ja dankis por ligiĝ' federa
al homfratin', post ol, falintaj
venkitoj, ni nur kuŝis, lacaj
pro sangoperdo, trans forpasaj
espero, kred', bataloj blindaj?

ZOLTÁN JÉKELY

PRO L' PENS'

Pro l' pens', ke eble mortos mi vespere
kaj vi ne fermos al mi la okulojn,
mi ĉirkaŭrigardadas frostsufere
tra la ĉambro, preskaŭ inter larmoruloj.
Mi kurus, kiel knabo, al la strato
kaj „homoj, helpon!" krius tim-alarmon.
Danĝeroj oldaj reas, en ĉi stato
mi restis sola, kiu donos varmon?
Mi krius voke al patrin', avino,
ĉiu virin' dotinta min per am',
por varmo, don' de l' tera vivdestino,
anstataŭ Vi — por Sun' falinta jam.
Ĉar tiel statos homo, kiu inde
ne taksis de l' amantoj amfervoron:
sen la amata, olde, fridiĝinte,
de l' morna mort' atendos la hororon.

Tr. K. KALOCSAY

Fondiĝis la Internacia Kodály-Societo

En Hungario, en la urbo Kecskemét, oni tenis la II. Internacian Kodály-seminarion inter la 5-a kaj 13-a de aŭgusto. La partoprenantoj de la simpozio — ĉirkaŭ cent senditoj el 17 landoj — decidis, ke ili kreos internacian societon, kies celo estas la disvastigo de la muzikpedagogia metodo de Kodály. En la ferma kunsido oni ankaŭ elektis la prezidantaron de la Internacia Kodály-societo. Prezidantino fariĝis la Aŭstralia Deanna Hoerman; *honora prezidantino la* vidvino de Zoltán Kodály. *La du vicprezidantoj:* Péter Erdei, *direktoro de Muzikpedagogia Instituto Zoltán Kodály en Kecskemét kaj* László Vikár, *kunlaboranto de la Muzikscienca Instituto de l'Hungara Scienca Akademio en Budapeŝto; kiel afergvida sekretario estis elektita* László Eösze, *faksekretario de Muzikverk-eldonejo; la kontoro de la afergvidanto estos en Budapeŝto. Ankaŭ tio estis decidita, ke estonte ĉiun duan jaron oni aranĝos internacian Kodály-seminarion.*

Trad. K. K.

Géza Bárczi (1894—1975)

akademiano, honor-prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio mortis la lo-an de novembro. Li estis dum la lastaj jardekoj la plej granda hungara lingvisto, la ĉefa parto de lia laboro la latinidaj lingvoj, sed li verkis ankaŭ gravajn volumojn pri la malnova hungara lingvo kaj pri la hodiaŭa „budapeŝta lingvo". Lia ĉefverko estas „La biografio de la hungara lingvo", kiu aperis dum jardeko jam trifoje. — G. Bárczi kiel studento lernis Esperanton, redaktis Esperantan revuon kaj tradukis kvin bildojn el la „La tragedio de l' homo" de Imre Madách. En siaj lastaj jaroj li agis multe por nia afero. Sur la paĝoj de Eszperantó Magazin ni povis publiki de li kelkajn altvalorajn artikolojn.

Mór Korach (1887—1975)

akademiano, honor-prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio mortis la 29-an de novembro. Vivante dum jardekoj en Italio li estis unu el la fondintoj de la ŝtata ceramika instituto en Faenza. Li estis universitata profesoro en Bologna de 1925 ĝis 1952, intertempe li publikis altrangajn novelojn sub la nomo de Marcello Cora en diversaj progresivaj italaj, revuoj, kaj tradukis en italan lingvon hungarajn poetojn. En 1952 invitis lin hejmen la hungara registaro, kaj li ludis gravan rolon kiel direktoro de la akademia ceramika esplor-instituto kaj kiel katedro-gvidanta profesoro en la Budapeŝta Teknika Universitato. Ekde sia junaĝo li estis adepto de la internacia lingvo, multfoje li intervenis ĉe la altgradaj hungaraj kaj internaciaj forumoj por intereso de Esperanto.

La morto de Géza Bárczi kaj Mór Korach estas granda perdo de la hungara, eĉ la internacia esperanta movado. Tamen iliaj spiritaj heredaĵoj helpos nian aferon plue. Ilia vivo meritas nian profundan dankon kaj estimon.

M. Gergely

Nova grava iniciato

NI POVAS RAPORTI PRI NOVA, GRAVA KAJ INTERESA INICIATO, KIES UNUA REZULTO ESTAS LA SUBA PROTOKOLO. NI ESPERAS, KE EN LA VENONTAJ JAROJ SEKVOS ALIAJ PAŜOJ LA UNUAN MODESTAN SUKCESON.

PROTOKOLO

La 20-an de oktobro 1975 en Sofio, en la Asocio de Bulgaraj Verkistoj, okazis renkontiĝo inter la hungara verkisto Mihály *Gergely* — membro de la Asocio de Hungaraj Verkistoj, ĉefredaktoro de Hungara Vivo kaj Eszperantó Magazin, Angel *Todorov* — membro de la Estraro de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj kaj prezidanto de la Asocio de la Tradukistoj en Bulgario, Georgi *Avgarski* — membro de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj, poeto, redaktoro en Radio Sofia, Asen *Grigorov* — prezidanto de la Literatura Sekcio de la Asocio de Bulgaraj Esperantistoj, kaj ĝiaj membroj: *Bojaĝieva*, Esperanto-poetino, Stojan *Kostadinov* — sekretario de Bulgara Esperantista Asocio, Violin *Oljanov* — ĵurnalisto, prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj—Filologoj, Kunĉo *Vâlev* — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto", kaj la membroj de la Redakta Komitato de tiu ĉi revuo: Ĥristo *Gorov* — vicprezidanto de BEA, Krâstju *Karucin* — membro de la Estro de BEA kaj gvidanto de fako „Informado".

La renkontiĝon malfermis Kunĉo Vâlev, kiu klarigis la kaŭzon de ĝia kunvoko kaj prezentis la ĉeestantojn, post kio donis la parolon al M. Gergely.

Mihály Gergely, kiu vizitis nian landon enkadre de la kultura interŝanĝo laŭ la kontrakto inter la Asocio de Bulgaraj Verkistoj kaj la Asocio de Hungaraj Verkistoj, venis kun intenco partopreni renkontiĝon kiel tiun ĉi. Li siigis, ke li faris proponon al la Sekretariato de la Asocio de Hungaraj Verkistoj iniciati diskutadon pri la problemo de la multlingveco kaj pri ĝia konkreta solvo en la rilatoj de la verkistaj asocioj kaj la verkistoj mem de la socialismaj landoj. M. Gergely substrekis, ke ĉi tiu problemo estas komplika kaj malfacila, sed esprimis certecon, ke per sistema kaj celdirektita laboro post kelka tempo oni povos atingi realajn rezultojn, ĉar la problemo tuŝas ĉiujn kaj aparte la majstron de la vortoj. Li esprimis la opinion, ke estus utile, se oni preparus kaj kunvokus konferencon de verkistoj kaj aliaj literaturaj agantoj el la socialismaj landoj, en kiu oni ĉiuflanke kaj science pridiskutu la problemon de la multlingveco.

Angel Todorov opinias la iniciaton de M. Gergely utila kaj aktuala. Li rakontis pri la agado de la Asocio de Tradukistoj en Bulgario, kies prezidanto li estas, kaj substrekis, ke estas celkonforme fondi grupon de tradukistoj el kaj en Esperanton, kiu funkciu kiel kolektiva membro de la Asocio. Angel Todorov emfazis, ke la popularigo de la bulgara literaturo en eksterlando kaj la konatiĝo kun la fremdaj naciaj literaturoj pere de Esperanto, estas utila patriotisma kaj internacia kultura afero. Li deklaris, ke estas dezirinde, ke ekzistu pli intima kaj organizita ligo inter la literatoroj-esperantistoj el la socialismaj landoj, al kiu iom post iom aliĝus demokratiaj literaturaj agantoj el la tuta mondo. A. Todorov opinias, ke estas ebla enkadre de la kultura interŝanĝo, efektivigita laŭ la kontrakto inter la verkistaj asocioj de Bulgario kaj Hungario, enlistigi ankaŭ literatorojn-esperantistojn. Li trovas utila la ideon kunvoki konferencon pri la problemo de la multlingveco. Fine Angel Todorov deklaris, ke li persone subtenos ĉiun iniciaton, kiu celas aktivigi la esperantistan literaturan vivon.

Sekvis diskuto, fine de kiu oni akceptis la jenajn rekomendojn:

1. Oni publikigu informon pri la renkontiĝo en la bultenoj de la Asocio de Tradukistoj en Bulgario kaj la Tradukista Sekcio de la Asocio de Hungaraj Verkistoj.

2. Oni faru proponon al la estraroj de la verkistaj asocioj en Bulgario kaj Hungario por enlistigo de literatoroj-esperantistoj en la kulturan interŝanĝon de ambaŭ asocioj laŭ la akceptita kontrakto.

3. Oni faru proponon al la estraroj de ambaŭ asocioj pri organizo de konferenco — kiam la kondiĉoj estos preparitaj pri tio — de reprezentantoj de la verkistaj kaj tradukistaj organizaĵoj en ambaŭ lando en kiu oni diskutu la problemon pri la multlingveco.

En la nomo de ĉiuj ĉeestantoj subskribis:

Angel Todorov — Mihály Gergely

Asen Grigorov — Kunĉo Vâlev

26-a Hungarlanda Esperanto-kongreso en Komló

Post kelkjara paŭzo, en 1974 Hungara Esperanto-Asocio revivigis organizi landajn kongresojn. SZOLNOK, jubileanta la 900-jaran datrevenon de sia urbiĝo, gastigis la 25-an kongresan en 1974. La statuto de HEA ja ne preskribas devige pri landaj kongresoj, tamen, plenumante la ĝeneralan deziron de delegitoj, la estraro de HEA decidis en dujaraj intervaloj okazigi la manifestacion de la hungara esperantistaro ĉiam en alia urbo.

La 25-jara socialisma urbo KOMLÓ invitis la 26-an Kongreson por 1976 en la kadro de siaj jubileaj aranĝoj.

Post la dua mondmilito KOMLÓ — 22 km-ojn distance de *departementa rezidejo* PÉCS, kaŝiĝis ankoraŭ en nekonateco kiel modesta vilaĝo de ministoj en la koro de la montaro MECSEK (meĉek). Laŭ la unua 5-jara ekonomia plano ĝi evoluis en la unuan socialisman minurbon de Hungario. La urbo konstante ŝanĝiĝas, konstruiĝas, beliĝas. La urbo situas sur montoj kaj deklivoj, ĝia logantaro fieras pri la komparo, ke ilia urbo situas sur sep montetoj kiel Romo. La malnova miksiĝas ĉi tie kun la nova: kamentuboj de fabrikoj, ŝaktoturoj kaj surŝnuregaj vagonetoj gaje salutadas florajn parkojn kun statuoj. Kaj ĉio estas inter verdaĵo. Ne nur la ĉirkaŭaj arbaroj verdas, sed ankaŭ la urbo. Arbovicoj bordas la stratojn, la loĝejojn de la ministoj, per kies laboro la lando gajnas nigran karbon po 2 milionojn da tuno en jaro. La minejon simbolas monumento betona sur monteto en la urbocentro. Ĉi tiun simbolon prezentas la insigno de la 26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso.

Ministoj en Komló

El kiu ajn direkto ni venas al KOMLÓ, unue la bele kulturitaj ĝardenoj, multkoloraj semajn-finaj dometoj prezentiĝas surdekline. Ravas nin la varie bela ĉirkaŭaĵo dum veturo sur la serpentumanta ŝoseo tra arbaroj, kaŝejoj de cervoj, kapreoloj.

En MÁNFA ni preterpasas ĉarman kapelon en pura romanika stilo el la epoko de la dinastio Árpád. La arbaro ĉi tie estas paradizo de ĉasistoj, la lago de SIKONDA allogas fiŝhokistojn. En agrabla, arbara valo SIKONDA ofertas refreŝigon per termobasenoj kun varma kaj malvarma akvo. Ĉi tie troviĝas ankaŭ sanatorio por la ministoj de KOMLÓ.

La gvidantaro de la urbo KOMLÓ jam de 7 jaroj protektas Esperanto-Grupon. Partoprenintoj de Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN) volonte rememoras pri la afabla akcepto far la urbestro de la minurbo. Liaj entuziasmaj klarigoj pri lia urbo vekis rekonon de eksterlandaj IREN-anoj. Tion pruvas iliaj salutkartoj al k-do József Gallusz.

Malnova preĝejo en Mánfa — Fotoj de Teréz Barna

La unuaj informoj pri la organizota Esperanto-Kongreso en KOMLÓ entuziasmigis la lokajn esperantistojn. Afiŝoj de la urba konsilio anoncas la okazontan Kongreson. Organizaĵoj, societoj, filatelistoj, radioamatoroj, kulturaj instancoj, lernejoj ofertas subtenon, kontribuon al la tritaga aranĝo, kies organizadon helpas ankaŭ la Teritoria Komitato de HEA en PÉCS. Ja ankaŭ ĝi jubileos en 1976: antaŭ 10 jaroj, en 1966 ĝi aranĝis la 22-an Internacian Junularan Kongreson ĝis nun la plej multnombran.

La antikva urbo PÉCS ĉiam famis pri sia kulturo. En la 20-aj jaroj ekfunkciis Esperanto-movado ĉi tie. Inter la pioniraj esperantistoj de la malnova „SOPIANAE" pluraj estas internacie konataj. Ilian senlacan aktivecon transprenis nova generacio. Al tiu nova adeptaro apartenas la entuzasmaj LKK-anoj, kiuj prepariĝas inde akcepti la manifestacion de la 26-a Hungarlanda ESPERANTO-KONGRESO, disponigi agrablan restadon por la esperantistoj en la jubileanta urbo, kiu gastame atendas la partoprenantojn.

Elizabeta PALLÓS

Pri Esperanto en la sindikata konferenco

En Praha okazis inter la 27-a kaj 30-a de oktobro 1975 la VII-a konferenco de Internacia sindikata unuiĝo de laboruloj en konstru-kaj ligno-industrio (UITBB), ano de Tutmonda Sindikata Federacio (TSF), kun 250 delegitoj el 55 landoj.

Membro de la franca delegitaro *Petro Levi*, la prezidanto de SAT, reprezentanta la sindikatan unuiĝon de cement-tindustrio de CGT (Ĝenerala Labor-Konfederacio) prezentis antaŭ la forumo en la lasta kunsida tago la problemon pri la internacia lingvo. Li rilatis sin al la favora eĥo, kiun vekis en 1974 la intervjuo kun *Sándor Gáspár*, ĝenerala sekretario de la hungara sindikata konsilantaro, pri la utileco de Esperanto en la internaciaj rilatoj de laboristoj kaj sindikatanoj.

La lingva problemo, diris P. Levi, postulas seriozan pripenson kadre de TSF, plue en la Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj kaj en la Tutmonda Konfederacio de Laboro. Ĉiuj sindikatoj interesataj povas integrigi Esperanton en sia kultura aktiveco, por internaciskala etendigo de la sindikataj rajtoj kaj por faciligi la reciprokan rilatojn. En sia referaĵo li pledis por integriĝo de la laborulaj postuloj frunte al la kapitalisma krizo kaj danĝeraj manovroj de la multnaciaj societoj.

Al la interveno venis kalkaj reagoj. La hungara kaj greka delegitaro varme subtenis ĝin — ili intencas progresigi la aferon sur konkreta tereno, opiniante krei specialan komisionon sur la nivelo de UITBB aŭ tiu de TSF. Aliaj delegitoj evidentigis per sia sinteno ĝenerale, ke ili apenaŭ konscias pri la problemo. Diversaj estis ankaŭ le reagoj de la interpretistoj.

La estro de UITBB, kiel konfirmis P. Levi, konsideris la proponon de la hungara delegitaro „ne la ĉefa, sed grava". Espereble tiu ĉi pozitiva starpunkto de UITBB influos iniciatojn en aliaj sindikataj organizaĵoj.

O. Knichal

ZOLTÁN ZELK

EPITAFO

Nur honto kreskas, hont-sur-honte,
ke mi transvivis vin ĉi-monde
ho vi, ho mia Animo, Stel';
pardonu al mi senriproĉe
minutojn pluvivatajn loĝe
sur jena neloĝebla stel'.

NAŬ VERSOJ PRI FELIĈA HORORO

Nenie hom', nur frap', frap' de l' silento —
nenie hom', jen vi renkont-salute.
Nenie hom', resonas la silento —
nenie hom', mi vin postgapas mute.
For mia sol', arida indiferento,
Tim-trem' feliĉa jen, ĉiuminute
rekreskas, verdas jam en mia koro —
vi donis, ke en mia anim' reestas
la mort-hororo.

Tr. Márton FEJES

Impresoj de novbakita ĵuriano

Antaŭ kelkaj jaroj mi artikolis sur la paĝoj de HV pri la problemoj de la originala literaturo, kaj mi skribis ion tian, ke „foje mi volontege trafoliumus la nepremiitajn verkojn de la ĉiujaraj Belartaj Konkursoj".

Nu, pasintjare oni petis min fariĝi ĵuriano de BK pri originala prozo kaj dramo, kaj tiel mi havis eblon ne nur trafoliumi, sed eĉ zorge trastudi ĉiujn konkursaĵojn. Verkante mian supre cititan artikolon antaŭ kelkaj jaroj, mi estis konvinkita, ke inter la alsenditaj konkursaĵoj certe troviĝas perloj, kiujn la miopa ĵurio ne rimarkas. Mi eraris. Tiaj ne troviĝas. Sed troviĝas multaj konkursaĵoj, kiuj postrestas al la meza nivelo de liceaj konceptaĵoj.

La plej multaj konkursantoj malhavas eĉ bazajn konojn pri la internaj leĝoj de literatura verko. Estas evidente, ke ili ne legas sufiĉe — almenaŭ ne bonan *literaturon — nek en Esperanto, nek en sia nacia lingvo. Mankas eĉ epigonismo, kiu, kvankam iom strabe, tamen elmontrus ian strebon por la perfekteco. Ne. La konkursantoj videble kredas la praan superstiĉon, laŭ kiu artisto naskiĝas, ne fariĝas. Do, ili ne lasas sin influi de iaj Flaubert aŭ Borges.*

Iliaj temoj estas preskaŭ senescepte „grandaj". La filozofio, la mondsavaj bombastoj estas tre popularaj inter la konkursantoj, videble ili kredas, ke el grandaj temoj pli facile oni faras grandan verkon. Sed tio estas eraro: se oni alfrontas grandan temon kun nesufiĉa talento, la rezulto estos banalaĵo.

La samo validas pri la stilo de la verkoj. Ĉar la poezio estas konsiderata kiel pli altranga artformo ol la prozo, oni supozas, ke poezia (aŭ poeziaspekta) stilo per si mem altigas la nivelon de la prozo. Tio ankaŭ estas eraro. Multkolora, riĉe ornamita robo bone sidas sur bela virino, sed elvokas nur ridon, se viro survestas ĝin.

La konkursantoj ŝajne ne vivas en Esperantujo, ili ne konas la verajn bezonojn de la esperantista legantaro, kiu volus legi ne receptojn por la savo de la mondo, aŭ pensojn naskiĝintajn, dum la aŭtoro rigardadis sian propran umbilikon, sed interesajn historiojn. Ĉu eble ili ne verkis por la publiko, sed por la juĝkomisiono de BK, kaj supozis, ke tiuj „erudiciuloj" preferas filozofiajn fuŝeseojn, spicitajn per iom da sentimentala lirikeco, al intereskaptaj noveloj?

Jes ja — por verki bonan novelon oni devas havi praktikon, rutinon *en la verkado (krom talento, kompreneble). Ray Bradbury foje diris: oni verku ĉiusemajne unu novelon, kaj post unu jaro — do, post la 52-a novelo — havante talenton, oni fariĝos jam legebla verkisto.*

Nu, la ĉijaraj kontribuaĵoj ne malmulte malĝojigis min koncerne la estonton de la originala prozo. Io nepre estus farenda, sed malfacilas diri, kio. Cerbumi pri la elirvojo estas komuna devo de ni ĉiuj.

V. BENCZIK

Poeto al poetoj



Ni citas el poemo de Lajos TÁRKONY: „Ho admirataj majstroj de versforĝoj...” — la daŭrigon de la citaĵo Vi trovas en la vicoj H. 1., V. 65. kaj V. 20. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon. Limdato de la esendo: la 20-a de marto

Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ: 17. Bazitaj sole nur sur supozoj. 18. Esprima aspekto de la vizaĝo. 19. Homoj apartenantaj al iu Eŭropa gento. 20. Samspecaj literoj de vero. 21. Scienca nomo de la kankro (Radiko). 23. Esti blanke varmega (R). 25. Poeta produktaĵo (R). 26. Latina virnomo, inter alia de la poeto de la „Ama Arto” kaj „Metamorfozoj” (sen o-finaĵo). 28. Muzika termino por signo lokata ĉe la komenco de la notliniaro por montri la nomon de ĉiu noto kaj ĝian altecon (R). 30. Temo inter du samaj okazintaĵoj (kun artikolo). 33. Momenta, neantaŭvidita vojŝanĝo de ŝipo, ordinare kaŭzita de vento aŭ de fluo. 34. Antigeno. 35. Karakterizan de la satelita planedo de Tero. 36. Sufikso por formi kolekton. 37. MZI. 38. Ano el la indiĝena gento, vivanta en Nov-Zelando (R). 39. Baptonomo de la unua kosmonaŭto. 41. Samspecaj literoj de sola. 42. Ĝenerala vivmaniero kaj kutima konduto de iu popolo, gento, provinco aŭ klaso (R). 43. Rokspeco, fendiĝanta en platajn tavolojn, uzata inter aliaj por fari tegmenton (R). 45. Epopeo de Vergilo pri la fondinto de la roma gento. 48. Donas havaĵon okaze de geedziĝo. 50. Apartenas al iu. 52. Pastraj ĝispiedaj mesvestoj el blanka tolo. 53. Numeralo. 56. Sin amuzus ekz. per muzikilo. 59. Miksita teo! 62. SDU. 63. Hejma servisto ĉe riĉuloj. 64. Plej delikata tolo el lino, kun artikolo (R). 65. Klara ĉielo, libera spaco super la nuboj. 67. Fiksi per ŝnuro (R). 69. Per forto aŭ per minaco forprenas al si ies posedaĵon. 70. Vortojn uzatajn por distingi objektojn aŭ estaĵojn disde aliaj. 72. La loko, kie du ŝtofpecoj estas kunfiksitaj per fadenĉeno. 74. Malalta, larĝa vazeto por trinki teon (R). 75. Samspecaj literoj de haro. 76. Via vestaĵo estas tie (du vortoj). 78. Opinii kaj deklari bona kaj akceptinda (R). 80. Sono veninta tra la laringo kaj buŝo (R). 81. Siberia rivero, ne esperantigita formo. 83. Rilata al bendo. 84. Maro (R). 85. Danckunveno. 86. Rilata al tropika arbo havanta pintajn foliojn. 89. ORZ. 90. Facile knedeblaj aŭ flekseblaj. 91. Produktaĵon de birdoj. 92. Ĝi beligas la verson (R). 94. Vertikale longaj. 96. Nitrogeno. 97. Fragmento, ono, ero. 99. Montros subitan gajecon. 101. La pli okcidenta kaj malpli granda el la du ĉefaj insuloj de la Brita insularo.

VERTIKALAJ VICOJ: 1. Sufikso por malgrandigo. 2. Tia homo bezonas trankviligon. 3. Reen: sufikso por derivi numeralojn. 4. Pašado per piedoj. 5. Fari alojon el fero kaj karbono. 6. Malutila ronĝulo (R). 7. Helena virnomo inter aliaj de du herooj en Iliado. 8. Reen: persona pronomo. 9. Poseda pronomo. 10. Specio de turdo, tre bele kantanta (R). 11. Ano de la ĉefgento loĝanta en suda regiono de la hispana duoninsulo (R). 12. Duono de ligo! 13. Sufikso montranta kolektivecon. 14. Ĝi donas lakton (R). 15. Grasa likvaĵo, krudmaterialo. 16. ... Prismo: literatura revuo kiun dum longaj jaroj redaktis F. SZILÁGYI. 22. Kapabla, per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taksi la aferojn. 24. Sur nenia loko. 27. Moviĝi per piedoj. 29. Enpaŝi. 31. Ne makulita (R). 32. Nomo de lago ĉe la limo de Kanado kaj Usono (RAJNA). 34. Specio de ŝafo el Centra Azio kun longa ondanta felo (R). 38. Hotelo por aŭtomobilistoj (R). 39. Rilata al juda profeto krucumita. 40. Ebenigi lignon per speciala tranĉa instrumento. 42. Ornamo, garnanta parton de konstruo aŭ de meblo. 44. Triangulforma muskolo servanta por levi la brakon (R). 46. El pluraj prenas pro prefero. 47. Kiel vico 48. horizontala. 48. Virina kapornamo. 49. La tuta korpo, kontraste al la psiko (R). 51. Soldato de malpeza kavalerio (R). 54. Senŝanĝa daŭra esto en la sama loko. 55. Komenco de kakofonio! 57. DJL. 58. La lastan tagon de la semajno. 60. Ne preni ĉambron por uzi dum difinita tempo pagante interkonsentitan prezon. 61. Vicreĝo aŭ guberniestro en la islama Hindujo (R). 66. Insekto kies larvoj parazitas en la kapo de ŝafoj (R). 68. Difavoro. 71. Sol-solaj. 72. Antikva ĉaro kun kvar ventumile jungitaj ĉevaloj (R). 73. Rilata al muzika teatro. 75. La ... pupo: gaja teatraĵo de Julio BAGHY, temperamentoplena vodevilo kun la muziko de Mihály SÁROSI, prezentita dum la 51-a Universala Kongreso. 77. Grekdevena scienca vortkomenco, signifanta: nazo. 79. Nomo de lago apud la iama Petrogrado ĉe kiu LENIN sin kašis en la jaro 1917 antaŭ sia fuĝo al Finnlando (RAZLIV). 80. Malalta terparto pli-malpli ĉirkaŭata de montoj (R). 82. Ano de la ĉefgento loĝanta en unu el la ŝtatoj de la Germana Federacia Respubliko (R). 83. ... Fé: granda urbo en Argentino apud Paraná. 85. Blekas la hundo. 87. Grava elemento de muzikaj instrumentoj (R). 88. Amatino de Radameso en la opero de VERDI. 90. Logike kontraŭe. 93. Transigi objekton en alian lokon (R). 95. Numeralo. 98. Finaĵo de la aktiva indikativa futuro. 99. Radiumo. 100. Duono de sako! 102. Kantos meze! 103. Kiel vico 98.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 75/4 estas: LA MONDLINGVISTO, LA DORNA KARESILO, ORATORA KONKURSO

Libropremion gajnis: STANISLAW JANUSIEWICZ el Pollando, KOVALCZ GYÖRGYNÉ kaj SELÉNYI LÁSZLÓ el Hungario

Kelkfoje jam okazis, ke pro teĥnikaj kaŭzoj nia revuo aperis malfrue, eble nur kelkajn tagojn antaŭ la limdato, kiun ni donis por ensendi la ĝustan solvon.

Ĉi-foje ni sciigas niajn legantojn, solvantojn, ke ni povos akcepti solvojn ankaŭ post la menciita limdato. Se eble, oni klopodu, ke la solvon ni ricevu ĝustatempe; se tio ne estas realigebla, ankaŭ tiam ni atendas la solvojn. Ĉiu ĝusta solvo partoprenos en lotumado, nur la malfrue ricevitaj — okaze de la redaktado de sekvonta numero.

Kalendaro

Antaŭ 46 jaroj la 3-an de novembro 1929 mortis Jan Micislaw *Baudouin de Courtenay* (boduen de kurtnej), pola lingvisto, mondfama slavisto. Li ne nur apogis, sed ankaŭ sciis Esperanton, kaj aperigis multajn artikolojn en la Internacia Lingvo.

Antaŭ 51 jaroj, la 6-an de novembro 1924 naskiĝis William *Auld*, elstara figuro de la originala poezio. Lia lirika eposo, *La Infana Raso* (1956, 1968) estas unu el la ĉefaj atingoj de la esperanta literaturo.

Antaŭ 52 jaroj, la 15-an de novembro 1924 mortis Aleksandro *Giesswein*, katolika prelato, parlamenta deputito, prezidanto de la Hungarlanda Esperanto-Societo. Antaŭ la unua mondmilito li estis pioniro de la pacifismo, feminismo kaj aliaj sociaj movadoj en Hungarlando. Li aktive partoprenis la esperantistan vivon — al Stanislav Schulhof lin ligis amikeco.

Antaŭ 121 jaroj, la 19-an de novembro 1854 naskiĝis Henri *Valienne*, patro de la esperanta romano. Liaj du ampleksaj verkoj *Kastelo de Prelongo* (1907) kaj *Ĉu li?* (1908) certe ne apartenas al la kremo de la ĝenro, tamen decide akcelis la evoluon de la originala prozo.

Antaŭ 55 jaroj, la 20-an de novembro 1920 aperis en Kolonjo la unua numero de *Heroldo de Esperanto*, tiam titolita *Esperanto Triumfonta*.

Antaŭ 73 jaroj, la 29-an de novembro 1902 naskiĝis Lajos *Tárkony* (Totsche), elstara figuro de la originala poezio.

Antaŭ 14 jaroj, la 30-an de novembro 1961 mortis Imre *Baranyai* (EMBA), kiu estas la unua esperantista poeto batalanta per siaj verkoj por la socialismo. Kolekto de liaj poemoj aperis sub la titolo *En ekzilo kaj azilo* ĉe Stafeto.

Antaŭ 74 jaroj, la 6-an de decembro 1902 naskiĝis Nikolao *Hovorka*, aŭstra esperantista poeto. Liaj poemoj aperis en la antologio *Dekdu poetoj* (1934).

Antaŭ 111 jaroj, la 10-an de decembro 1864 naskiĝis Heinrich August *Luyken*, esperantista romanisto. Entuziasmiĝinta per la sukcesoj de Valienne, li verkis kvar ampleksajn romanojn: *Paŭlo Debenham* (1912), *Mirinda Amo* (1913), *Stranga Heredaĵo* (1922) kaj *Pro Iŝtar* (1924), kiuj verkoj multe kontribuis al la stabiliĝo de nia beletra proza stilo.

Antaŭ 116 jaroj, la 15-an de decembro naskiĝis Ludoviko Lazaro *Zamenhof*, aŭtoro de Esperanto.

Antaŭ 46 jaroj, la 15-an de decembro 1929 mortis Marie *Hankel*, populara figuro de la originala poezio antaŭ la unua mondmilito.

Antaŭ 103 jaroj, la 17-an de decembro 1872 naskiĝis Valdemar *Langlet*, sveda esperantisto, unu el la kunredaktoroj de la gazeto *Lingvo Internacia* dum la krizaj jaroj 1895—1899.

Antaŭ 85 jaroj, la 18-an de decembro 1890 naskiĝis Nikolaj Vladimiroviĉ *Nekrasov*, soveta esperantista poeto, tradukisto kaj eseisto. Lia ĉefverko estas la traduko de *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin.

Antaŭ 73 jaroj, la 23-an de decembro 1902 naskiĝis L. N. *Newell*, angla esperantista poeto, novelisto kaj tradukisto. Kolekto de liaj noveloj aperis en 1938 sub la titolo *Bakŝiŝ*. En la sesdekaj jaroj li retradukis la Hamleton de Shakespeare.

(V. B.)

Hungarlando invitas Vin por 1976

partopreni la subajn esperantistajn aranĝojn:

1976 06 25/27 *Komló — 26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso.* Organiza komitato: 7301 Komló, Pf. 64. Limdato de aliĝilo: 76 03 30.

07 04/10 *Gyula — 14-a Somera Esperanto-Universitato.* Org. kom.: 5700 Gyula, 48-as tér 11. Limdato de aliĝilo: 76 05 31.

07 18/27 *Abaliget—Pécs — 9-a Internacia Renkontiĝo Naturamika* kun Konferenco de Monda Turismo. O. k.: 7601 Pécs Pf. 2. Limdato de aliĝilo: 76 05 01.

08 17/22 *Budapest—Balaton—Danubo — 5-a Varia Internacia Semajno.* O. k.: 1443 Budapest Pf. 153. Limdato de aliĝilo: 76 06 30.

76 12/28 — 1977 01 02 *Budapest, 6-a Vintra Esperantista Ferio.* O. k.: 1443 Budapest Pf. 153. Limdato de aliĝilo: 76 10 31.

Nur por esperantistaj pioniroj:

76 08... *Zánka — 9-a Pionira Internacia Tendaro.* O. k.: 7601 Pécs Pf. 2. Limdato de aliĝilo: 76 03 15.

Teritoriaj renkontigoj de Hungara Esperanto-Asocio

al kiuj estas invititaj ankaŭ esperantistoj el la najbaraj landoj.

1976 01 31/02 01 *Győr — Karnavala Esperantista Renkontiĝo.* Adreso: 9002 Győr Pf. 228.

02 28/30 *Pécs — Semajno de Internacia Amikeco.* Adr.: Pécs. Pf. 2.

04 03/06 *Eger — Junulara Esperantista Renkontiĝo JER.* Adr.: 3301 Eger Pf. 105.

05 07/09 *Budapest — montaro Börzsöny: Zamenhof—pacmarŝo.* Adreso: Budapest Pf. 153.

05 16 *Makó — Pac-Renkontiĝo.* Adreso: 6701 Szeged Pf. 510.

07 11 *Budapest — Internacia Virina Renkonto.* Adreso: 1368 Budapest 5. Pf. 193.

09... *Szombathely — Turistaj Tagoj.* Adreso: 9700 Szombathely Pf. 45.

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1975. 6-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: K. Kalocsay
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, László Rieth, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Rózsa Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 Budapest. V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Eksterlande disvastigas „KULTÚRA" Eksterlandkomerca Entrepreno por Libroj kaj Gazetoj — 1389 Budapest, Pf. 149. Abonprezo por eksterlandanoj jare 6 Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto.

75. 805 Dürer Nyomda
Indexszám: *25.377*

FELIĈAN NOVAN JARON DEZIRAS

LEHEL

MODERNA ASMTRUM ADO
MODERNA FRIDUJO

Produktas: FRIDUJFABRIKO

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en supraj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I. Hess András tér 3
Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság útja 27